

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

5


1994

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Ĉe sunsubiro

Foto de YAN JIN

INTER NI

Kiel kompreni?

En numero 8-1993 de EPC aperis artikolo verkita de Zhao Xinghua kun la tilolo "Verdaj arboj kresku ĉie sur la tero". Ĝi donas helan bildon pri la

estonteco de la arbaroj sur la tero. Interalie la aŭtoro informas: "En la lastaj jaroj forstoj rapide disvastiĝis en aziaj evoluantaj landoj. Ĉiujare ili arbarizas 3 milionojn da hektaroj da kampoj kaj investas por tio miliardon da usonaj dola-

roj."

Numero 1-1994 de EPC havas ankaŭ artikolon pri la arbaroj en la mondo. Sed la aŭtoro Liang Wen vidas la situacion en Azio tute alie: "Rapida kresko de loĝantaro de Azio kaj senbrida hakado senĉese forkonsumas la tieajn arbarojn. En 1991 la areo de arbaroj de Azio malgrandiĝis je kvin milionoj da hektaroj, kvareble pli multe ol la perdokvanto antaŭ dek jaroj. La Grena-Agrikultura Programo de UN montris, ke nun en Azio la nove kulturataj arboj estas nur dekono de la perdiĝintaj arboj. Specialistoj avertis, ke la terglobo baldaŭ perdos la aziajn arbarojn."

Kiel oni prijuĝu kaj komprenu la artikolojn, kiuj tiel akre kontraŭdiras unu la alian?

LENNART PERSSON
(Svedio)

Prizorgante la mondan ekologian medion, s-ro Lennart Persson atente legis niajn du supre menciitajn artikolojn kaj komparis ilin. Ĉi tie ni admiras lin pri lia seriozeco.

Releginte la du artikolojn, kiujn menciis s-ro Lennart Persson, ni rimarkis, ke la unua artikolo raportas, ke oni savas arbarojn per grandarea forstumado post ilia perdiĝo; kaj la dua temas speciale pri la grava detruigo de arbaroj por averti la publikon kontraŭ la senbrida hakado kaj senĉesa forkonsumado de arbaroj. Kvankam la du artikoloj temas pri arbaroj en Azio de malsamaj flankoj, tamen ni ne evitis unuflankecon, kiam ni faris emfazon. Tio estas atentinda por ni en nia estonta raporto.


La Red.

ENHAVO

- 2 *INTERNI*
- 4 Vizito de la regiono inundita de la Flava Rivero
- 6 Pri tekniko de ŝipkonstruado en Ĉinio
- 8 *EKONOMIE:*
Pri reformado de ŝtataj entreprenoj
- 9 Ĉinio ekspluatas petrolon en malprofundaj maroj
- 10 Entreprenejoj de kvar fratoj
- 12 *VOĈO DE E-ISTOJ:*
Vojaĝo al suda Ĉinio
- 15 *ESP-NOVAĴOJ*
- 16 *SUR NIA LIBROBRETO:*
"Paŝtisto kaj Feino"
- 17 *POR KOMENCANTOJ:*
Lumo de blindulino
- 17 *MEM PROVU*
- 20 *ĈE YANGZI-RIVERO:*
Nankino al internacia urbego
- 24 De Interna Mongolio al Gansu
- 26 *SUR SCENEJO:*
Juna tibeta dancistino
- 28 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 29 *BELA ĈINIO:*
La Longa Koridoro en la Somera Palaco
- 32 Por doni puran akvon al pekinanoj
- 36 *ĈINA KULTURO:*
Originalaj historiaj libroj
- 38 Dong Jianhua — fama ĉin-medicina kuracisto
- 40 Epopeo "Gesal" kaj ĝia disvastigo
- 41 *SENTENCOJ DE FILOZOFOJ:*
Han Fei pri leĝa sistemo
- 42 *POR VIA SANO:*
Simpla ĉigong-ekzercado
Kion maljunuloj devas atenti en la fizika ekzercado?
- 43 "Kretacea parko" de Ĉinio
- 44 En domo de oficistoj kaj laboristoj
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *METIARTAĴOJ:*
Miniatura kajto
SUR LA KOVRILO:
En Potala-palaco de Tibeto
Foto de **Liu Wenmin**
- 2 Ĉe sunsubiro
- 18 En kokosarbaro
SUR LA DORSKOVRILO:
[*FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ*]
Manplektita tapiŝo kun Esperanta vorto
Vintra pejzaĝo en Belgio

LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Zhoukou (p. 4)
1. Chengdu (p. 10)
3. Huangyan (p. 12)
4. Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio (p. 24)
5. Gansu-provinco (p. 24)
6. Xixia-gubernio (p. 43)



Vizito de la regiono inundita de la Flava Rivero

ELIRINTE el kanjono en Henan-provinco, la Flava Rivero senbride torentas kaj lasas multe da dezertaj signoj sur la vasta ebenaĵo en siaj meza kaj malsupra basenoj. Laŭ historiaj notoj, en 2 540 jaroj (602 a.K. — 1938) la Flava Rivero breĉiĝis pli ol 1 500 fojojn kaj 26-foje ŝanĝis sian vojon. La 9-an de junio 1938 oni breĉis la digon de la suda bordo de la rivero ĉe Huayuankou pro milito. Kun tondra bruo, ondegaj altaj kiel muro sin ĵetis sudorienten. La katastrofo englutis 890 000 homojn kaj pro ĝi milionoj da loĝantoj perdis sian hejmon. 5 400 kvadrataj kilometroj da fekundaj kampoj fariĝis akvolando.

8 jarojn poste, oni riparis la breĉon kaj la rivero denove suriris sian malnovan vojon, sed la inundita regiono restis dezerta pro tro da salo kaj alkalo. Ĝin frekventis ventego kaj sablo. En 1950 okazis en Hindio internacia konferenco, en kiu multaj alilandanoj profetis: “La nordĉinia ebenaĵo fariĝos dezerto.” Sed tamen la regiono, kiu multe suferis de inundo de la Flava Rivero, hodiaŭ fariĝis fama produkto-bazo de greno, kotono, oledonaj plantoj, frukto kaj tabako.

VERDA EBENAĴO

Estis profunda aŭtuno. Mia aŭto rapide kuris en la regiono antaŭe inundita de la Flava Rivero. Ĉi tie sidas la urboj Kaifeng, Zhoukou, Shangqiu (Ŝangĉiŭ) kaj pluraj gubernioj. Ambaŭflanke de larĝaj vojoj prosperas altaj poploj. Sur vasta kampo staras paŭlovnioj (*Paulownia*), po unu por 5 metroj kaj kun linia interspaco je 40-50 metroj. La arboj formis gigantan bioprotektan sistemon kontraŭ vento kaj sablo. La arboj faris la vastan kampon grandega ŝaktabulo. Tie arĝentas kotono, verdas diversaj legomoj kaj tritikaj plantidoj.

Oni komencis la transformadon de la inundita regiono per plantado de paŭlovnioj. S-ro Wang Mingyi, gvidanto de la subprovinco Zhoukou, informis al mi, ke dank’ al la senĉesa penado en la pasintaj kelkdek jaroj, en la regiono nun kreskas 3 700 mil-

ionoj da arboj. Kiel protektantoj de la kampoj, tiuj arboj reduktis ventrapidon je 45-50%, vaporigo-kvanton je 20-30%, altigis la relativan temperaturon je 10-20%. Malaperis seka varma vento kaj la tritika produktokvanto altiĝis je 30-40%, kompare kun tiu en la pasinteco. En 1993, la totala grenproduktokvanto de la regiono superis 2 500 milionojn da kg. kaj la produktokvanto de kotono konsistigis ĉ. trionon de tiu de la tuta provinco.

La folioj kaj floroj de paŭlovnioj estas bona furago kaj la fekaĵo de brutoj sterkas la teron. La kultivado de paŭlovnioj akcelis la disvolviĝon de la tiea agrokulturo kaj faciligis la brutobredadon. Dank’ al la sukcesa plantado de paŭlovnioj prosperas la forstumado sur la ebenaĵo. Kiam la arbaroj iom post iom difektiĝis pro senbrida hakado kaj senĉesa forkonsumado en iuj montregionoj, ĉi tie la arbaroj kovras 15% de la regiona tero, sed antaŭ 1949 tie troviĝis apenaŭ neniuj arboj. En iuj gubernioj kaj urboj 20-30% de la tero estas kovritaj de arbaro.

En la regiono inundita de la Flava Rivero prosperas pli ol dek specioj de bonkvalitaj paŭlovnioj. Ilia ligno kun belaj vejnoj estas delikata, malpeza, tineorezista kaj taŭga por gravuro kaj meblofarado. En Shangqiu-gubernio funkcias entrepreno de paŭlovnio-lignaj produktaĵoj. Ĝia jara produktovaloro de rabotaĵtabuloj kaj aliaj produktaĵoj superis 100 milionojn da juanoj. Estro de la entrepreno informis al mi, ke la paŭlovnio-lignaj produktaĵoj estas ŝatataj de japanoj. Ili aĉetas paŭlovnio-lignajn meblojn por ornamo la novgeedzan ĉambron.

Forstokulturistoj el 55 landoj faris esploradon en tiu loko. Inter ili estis hinda fakulo, kiu ĝoje diris: “En Ĉinio mi vidis arbaron multe pli imponan ol la Granda Muro. Tio pruvas, ke mi erare maltrankvilis pro tio, ke la mondo fariĝos dezerto.”

AGRIKULTURO KUN APARTA STRUKTURO

Dum la 20 tagoj en la regiono mi rimarkis, ke la tieaj kamparanoj jam ne kontentas pri la tradicia

kulturo de tritiko, kotono kaj maizo. Ili nun aranĝas la agrikulturan strukturon laŭ la trajtoj de la lokaj klimato, grundo kaj merkata bezono.

Sur kotona kampo de Fugou-gubernio iu maljuna kamparano konigis al mi, kiel ili en la sama parcelo semas kaj replantas cerealon, kotonon, legomojn, akvomelonojn kaj aliajn ekonomiajn plantojn. En la unua tagdeko de oktobro ili semas tritikon, en kies interspacoj ili kultivas travintrajn legomojn, kiaj spinaco kaj junaj ajlopunkloj, kaj kovras la legomojn per plasta membrano. Marte de la sekvanta jaro ili povas rikolti la travintrajn legomojn kaj post tio ili plantas sub la plasta membrano plantidojn de akvomelonoj. En la mezo de majo ili semas 2 liniojn da maizo inter 6 linioj da tritiko. Post rikolto de tritiko kaj akvomelonoj en junio, ili kultivas aŭtunajn legomojn, kiaj celerio kaj tomato. En la unua tagdeko de julio ili kulturas ambaŭflanke de maizo lupinojn. Antaŭ la semado de tritiko ili rikoltas la aŭtunajn legomojn. Dank' al tio, la kamparanoj science kaj racie profitas de diferencoj de kresktempo, temperaturo, sterko kaj akvo, kiujn bezonas malsamaj plantoj, kaj plene utiligas la lumon, varmon, vaporon kaj grundon por multe altigi la produktokvanton. Sub la premisoj de stabila rikolto de greno kaj kotono, oni akiras ĉ. 10 000 juanojn sur ĉiu muo da tero (unu muo = 1/15 hektaro), t.e. 3-4-oble de la tradicia kultivo.

Yanling-gubernio estas fama gren- kaj koton-produktejo de Ĉinio, tamen en la longa tempo Yanling-anoj ne povis sin bonhavigi en agrikultura produktado. En la lastaj jaroj ili starigis produktobazon de ĉerizoj, akvomelonoj, legomoj, floroj kaj tabako. Responde al tio, ili funkciigis ankaŭ 2 800 entreprenojn de agrokulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. La produktaĵoj liveritaj de la produktobazoj superis duonon de la totala agrikultura kaj flankokupa produktokvanto de la gubernio, kaj 94% de ili estas vendataj. Dank' al tio, la kamparanoj multe bonigis sian vivon.

Profitante de sia geografia situo en la suda ekstremo por pom-kulturado en Ĉinio, Xihua-gubernio kaj la ŝtata farmejo de la inundita regiono plantis multajn pomarbojn. La tieaj pomoj estas ŝatataj de la frukto-merkato de suda Ĉinio. En la regiono inundita de la Flava Rivero mi plurfoje aŭdis la onidirojn, "Kiu volas sin riĉigi, tiu devas multe planti fruktarbojn", "Sub pomarboj kultivu cerealojn, tio riĉigas pli ol banko".

Eble pro profesia kutimo, mi ŝatis viziti kamparanajn familiojn dum mia restado en Weishi, Taikang kaj aliaj gubernioj. Mi rimarkis, ke oni plantis fruktarbojn en ĉiuj kortoj, antaŭ kaj post domo aŭ en vakaj lokoj, kaj bredas bovojn, ŝafojn, kuniklojn k.a. Dank' al tio, virinoj kaj maljunuloj havas sian laboron kaj rimarkindan enspezon.

(Daŭrigo sur p. 32)





Kampo, sur kiu kreskas fruktarboj, paŭlovnioj kaj grenplantoj

Vinbergardeno en la inundita regiono



En la Shangqiu-a Paŭlovnli-gnara Prilaborejo





Transporta ŝipo por likvigita naft-gaso, konstruita de Ĉinio

JIN NING:

Pri tekniko de ŝipkonstruado en Ĉinio

JAM en la antikveco la ĉina marvastajo fariĝis navigacia bazo. Kun la disvolviĝo de mara trafiko la tekniko de la ĉina ŝipkonstruado kontinue progresis. En la 14-a jarcento a.K. Ĉinio komencis fari lignan ŝipon kaj en la 2-a jarcento a.K. Ĉinio konstruis tri-kvaretaĝan ŝipon ekipitan per stirilo, remilo kaj julo. La 12-an jarcenton p.K. ĉina ligna velŝipo pilotita per kompas povis vojaĝi al Japanio, Arabio kaj Mediteraneo. Ĉirkaŭ la 15-a jarcento p.K. la ĉina ŝipkonstruado multe progresis. Zheng He (1371-1435 p.K.), fama navigisto de Ming-dinastio (1368-1644), sepfoje vojaĝis al la Okcidento gvidante pli ol 200 grandajn kaj malgrandajn ŝipojn, kio montris la altan ni-

velon de la ĉina ŝipkonstruado.

Dank' al la industria revolucio en la 18-a jarcento, la tekniko de ŝipkonstruado rapide disvolviĝis en la mondo. Tiam Ĉinio malfortigis pro foj-foja agresado fare de alilandaj trupoj. Alilandaj militŝipoj invadis ĉinajn marojn kaj dekadencis la ĉina ŝipkonstruado. En 1949 Ĉinio havis nur 20 grandajn ŝipkonstruejojn kun malpli ol 20 000 laboristoj. La jara produktokvanto de ŝtalaj ŝipoj estis ĉirkaŭ 10 000 toneloj, por ne paroli pri la disvolviĝo de tekniko de ŝipkonstruado.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la ĉina ekonomio revigliĝis. Oni kolektis kompetentulojn por ripari malnovajn ŝipojn kaj konstrui mez- kaj malgrandajn kargoŝipojn kaj cisternoŝipojn taŭgajn por riv-

era kaj ĉemara trafiko. Samtempe kun tio, Ĉinio penis kuratingi la mondan avangardan nivelon kaj reprosporigi sian ŝipkonstruadon.

Pasis 30-40 jaroj. En Ĉinio laboras pli ol 100 eksperimentaj establaĵoj por ŝipkonstruado, kiaj giganta akvobaseno kaj vent-tuneloj por eksperimento pri ŝipa mekaniko; komputera reto de akcesora desegnado por la ŝipo; laboratorioj pri mekaniko, kinetiko, elektropovo, elektroniko, aŭtomatizo, precizaj maŝinoj, akvoenergio, optiko, kemio kaj materialoj. Jen aperis la transfaka kaj teknike koncentra sistemo por studi pri ŝipkonstruado. Tie oni povas fari endoman studon, eksperimenton de sinsekvaj reguligoj de surtera sistemo kaj tiun en kvieta profunda lago kaj sur

maro. Tiel la tekniko de la ĉina ŝipkonstruado disvolviĝas sur la bazo de sistema kaj scienca eksperimento. Samtempe aperis en Ĉinio grupo da sciencistoj kaj teknikistoj kun fakaj scioj kaj riĉaj spertoj. Tio donis solidan garantion al la modernigo de la ĉina ŝipkonstruado.

En 1967 Ĉinio faris la unuan dekmil-tonelan kaj memprojektitan transoceanan kargoŝipon Dongfeng, kies ekipaĵoj estis produktitaj ankaŭ de Ĉinio. Tio estis rigardata kiel nova paŝo en la historio de la ĉina ŝipkonstruado. Poste, kelkdek dekmil-tonelaj ŝipoj estis faritaj en la ĉinaj grandaj ŝipkonstruejoj. Tio pruvis, ke la ĉina transoceanana navigacio rapide progresis.

La scienc-esplora ŝipo Xiangyanghong (Ŝjangjanghong) n-ro 10, konstruita en 1979, multfoje sukcese navigis sur suda Pacifiko. En 1980 ĝi kaj ĝia ĝemela ŝipo "J121" navigis la unuaj al Georg-insulo de Antarkto kaj starigis sur ĝi la stacion Granda Muro, la unuan esplorstacion de Ĉinio en la regiono. La ŝipo Xiangyanghong n-ro 10 gajnis la Specialan Premion de Progreso de

Scienco kaj Tekniko de la Ŝtato, la plej altan honoron de Ĉinio tiurilate.

En la sama jaro ekfunkciis Yuanwang (Jŭanŭang), alinome Sciencia Urbo sur Maro, ŝipo por spure mezuri artefaritajn satelitojn. La ŝipo havis dismeton de pli ol 20 000 tunoj kaj naŭetaĝan kajuton altan kiel 14-etaĝa domo. La ŝipo estis armita per pli ol 1 000 kompletoj da elektronikaj ekipaĵoj je pezo de 3 000 tunoj. Por garantii precizan mezuradon, en malpli-ol-sesagrada vento la korpo de la ŝipo ŝanceliĝis transverse ne pli ol kvin gradojn kaj vertikale ne pli ol 3.5 gradojn. Oni uzis stabilan koordinatan sistemon al la ŝipo kaj servan sistemon al la ekipaĵoj, tial per signaloj, senditaj de la regadejo de la ŝipo, la aŭtomata regado povas atingi ĝis sekundo, kio garantias la kontinuan stabilecon kaj precizecon de la veturado. Krome, oni ankaŭ lokalizas la ŝipon per inercia pilota sistemo, faras telekomunikadon en ĉia ajn vetero kaj severe bridas la bruon kaj skuiĝadon de la ŝipo. Ĝi sukcesis spure mezuri ĉiujn artefaritajn satelitojn lanĉitajn

de Ĉinio. En 1990-1992 ĝi spure mezuris la artefaritajn satelitojn Azio n-ro 1 kaj Optus-B2 lanĉitajn de Ĉinio por aliaj landoj. La ŝipo Yuanwang estis alte taksita de fakuloj kaj gajnis la Specialan Premion de Progreso de Scienco kaj Tekniko de la Ŝtato.

Nun navetas inter havenoj de diversaj landoj ĉinaj kargoŝipoj, plezurŝipoj, kontenerŝipoj, cisternoŝipoj kaj ŝipoj por kemiaĵo. Dank' al uzado de fiŝŝipo, balenŝipo kaj ŝipo por fridigo kaj prilaboro, la ĉina fiŝkaptata industrio rapide progresas. Scienc-esplora ŝipo, savada ŝipo, riparŝipo, ŝipo por submarana laboro, dragŝipo, glacirompilo k.a. ludas sian propran rolon sur maro. La disvolviĝo de la ĉina ŝipkonstruado rapidigas la evoluadon de la ĉina ekonomio, prosperigas la internacian merkaton kaj fortigas la internacian kunlaboron. La modernaj scienco kaj tekniko plivigliĝas ŝipkonstruadon. La disvolviĝo de la ĉina ŝipkonstruado enkorpiĝas la evoluadon de mekaniko, elektroniko, akustiko, optiko, elektro ktp.

Nun estas ne nur transportaj kaj submaraj ŝipoj, sed ankaŭ ŝipoj kun pneŭmata kuseno aŭ akvoglisiloj, kiuj povas veturi kaj en aero kaj en akvo. Anstataŭ la tradicia movforto de ŝipo, oni uzas elektromagnetan energion, akvoŝprucon, varmozoladon kaj nuklean energion por movi ŝipon. Mekanismo kaj elektroniko jam unuiĝis en la kampo de la tekniko de ŝipkonstruado. Sistemigo kaj aŭtomatizo multege ŝanĝis la tradician labormanieron de ŝipo. Realigis jam en Ĉinio la revoj pri aŭtomata stirado, senhoma kajuto, inercia pilotado, artefarita medio, aŭtomata kontrolado de perturbo kaj aŭtonoma preventado de katastrofo. ■

Novtipa flugboato



Pri reformado de ŝtataj entreprenoj

de HE GUOZHONG

EN Ĉinio estas pli ol dek mil grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj kaj du mil entreprenogrupoj kiuj estas posedataj de la ŝtato kaj rigardataj kiel la ĉefa parto de la ĉina nacia ekonomio. Tial la reformado de ŝtataj entreprenoj estas la peza tasko de la reformado de la ĉina ekonomia sistemo. En la pasintaj dekkelkaj jaroj la reformado sin direktis al plifortigo de la rajto de memdecido far la entreprenoj. Oni faris provadon en entreprenado laŭ kontrakto (entrepreno subskribas kontrakton kun la ŝtato kaj donas al ĝi imposton pagendan laŭ la kontrakto kaj povas mem disponi la restan parton de la enspezo), lua entreprenado kaj akcia sistemo.

Tamen, la tradicia entreprena administrado sub la sistemo de planizita ekonomio ankoraŭ ne estas tuŝita de la reformado de ŝtataj entreprenoj. Pro tio la problemoj, ke la registara administrado ne disiĝas de la entrepreno, la aparteno de entreprena proprieto ne estas difinita, la entrepreno ne havas la rajton de memdecido kaj ĝi ne posedas perfektan memregan organizon, longtempe ĝenas la ŝtatajn entreprenojn kaj ne estas solvitaj. Rezulte de tio, la ŝtataj entreprenoj ne havas viklecon nek donas deziratan profiton. Nemalmultaj el ili eĉ havas deficiton jaro post jaro. Ekz., en 1993 la ŝtataj entreprenoj en Heilongjiang (Hejlongĝjang)-provinco havis deficiton de pli ol ses miliardoj da juanoj, ĉar la

ŝtato difinis, ke pli ol 40% de la produktaĵoj de la ŝtataj entreprenoj en Heilongjiang devas vendiĝi je prezo fiksita de la ŝtato, kaj plie, grandega diferenco estis inter la fiksita kaj merkata prezoj. El tio videblis, ke kadre de la sistemo de planizita ekonomio estas malfacile vigligi la ŝtatajn entreprenojn.

Ĉinaj ekonomikistoj opinias, ke oni devas profundigi la reformadon de ŝtataj entreprenoj, por ke ili ludu ĉefan rolon en la merkata ekonomio. Tio signifas, ke la politiko por doni rajton kaj profiton al entrepreno (la entrepreno havas memdecidan rajton kaj povas distribui parton de la profito) devas esti anstataŭigita per la administra sistemo por determini la apartenon de proprieto, t.e. starigi modernan kompanio-entreprenan sistemon kun la sistemo de kompania leĝa persono kiel la ĉefa formo.

La kompanio-entreprena sistemo naskiĝis en Okcidenta Eŭropo kaj perfektigis en ĉiuj flankoj post centoj da jaroj. Multaj landoj praktikas la sistemon. La norma entrepreno povas bonefike apartigi la posedantecon de investanto disde la proprieto de leĝa persono de entrepreno, kio utilas al la disiĝo de registara administrado kaj entrepreno, transformiĝo de entreprena organismo, kolektado de kapitalo kaj dividado de riskoj. Ĉinio preparas sin por reformi la ŝtatajn entreprenojn surbaze de tiu ĉi sistemo.

La moderna kompanio-entreprena sistemo ankoraŭ estas fremda al Ĉinio. Ĉinio devas

antaŭ ĉio fari fundamentan preparon kaj serĉi vojon por praktiki la sistemon.

— Laŭplane transformi en kompaniojn la ŝtatajn entreprenojn bone funkciantajn. La grandaj ŝtataj entreprenoj, kiuj donas profiton, havas bonan administradon kaj sin direktas konforme al industriaj politikoj, transformiĝos en limigitajn akciajn kompaniojn kun la ŝtato kiel akciulo; la konkurencopovaj entreprenoj, kiuj observas industrialan administradon, transformiĝos plejparte en limigitajn respondecajn kompaniojn kun investo de la ŝtato kaj aliaj leĝaj personoj; kaj specialaj entreprenoj en limigitajn respondecajn kompaniojn kun la ŝtato kiel la ununura investanto.


— La entreprenoj kun bonaj kondiĉoj povas organizi limigitan respondecan kompanion aŭ akcian kompanion kunlabore kun eksterlandaj investantoj. La eksterlanda investo povas rekte eniri la kompanion aŭ esti uzata en ĝi kiel akcia kapitalo. La novaj kompanioj funkcios laŭ la nova sistemo.

— Disvastigi plue la anekson kaj unuiĝon kadre de entreprenoj. La entrepreno povas aneksi alian per aĉetado. Ŝtataj entreprenoj povas kuniĝi senpage sur la bazo de memvolo.

— Transloki la entreprenojn, kiuj malhelpas al la media protekto en urbaj distriktoj, aŭ turni ilin en novajn kompaniojn.

— Reformi malgrandajn ŝtatajn entreprenojn laŭ la rimedoj

(Daŭrigo sur p. 29)



Movebla platformo konstruita de Ĉinio

CHENGDAO estis ne multe konata loko ekster la enfluejo de la Flava Rivero, sed famiĝis pro granda petrolkampo en sia malprofunda maro. La ekspluatado de la petrolkampo komenciĝis antaŭ ne longe. Tio ne nur montris bonan perspektivon de petrolo industrio de orienta Ĉinio, sed ankaŭ inaŭguris la ekspluatadon de la petrolo riĉfonto en malprofundaj maroj de Ĉinio.

Ekster la haveno ĉe la enfluejo, 4 platformoj pompas sur la maro flava kaj ondanta. Post 12-marmejla ŝipveturo, oni venas al la Puto Chengbei n-ro 11, kie natura gaso brulas sur fajrobrako de cisternoŝipo. La varmo rostas homojn eĉ je 50 metroj fore. Ĉiu sendependa laborejo konsistas el platformo, cisternoŝipo, trenŝipo kaj ŝipo kun gaspetrolo disigilo. Nun la petrolkampo ĉiutage produktas 1 500 tunojn da nafto. Estas espereble, ke en 1995 ĝia jara produktokvanto atingos milionon da tunoj.

Bohai-Golfo, kie troviĝas la petrolkampo, estas malprofunda, kun averaĝa profundeco de malpli ol 20 m. Antaŭe sedimenta stratumo sterniĝis sur la marfundo tavolon post tavolo. Pro movado de la terkrusto, la stratumo kurbigis, kliniĝis aŭ faŭltiĝis. Kaj la petrolo fluas en la malaltajn lokojn de la stratumo kaj restas

Ĉinio ekspluatas petrolon en malprofundaj maroj

de LI JIN kaj WANG JIWEN

tie. Pro tio Bohai-Golfo fariĝis petroliĉa.


La Malprofund-mara Prospektora Korporacio de la najbara Shengli-Petrolkampo ricevis la taskon prospektori kaj ekspluati Chengdao-Petrolkampon. Krom tio la korporacio sendis prospektori en la malprofundaj Liaodong-Golfo kaj suda Bakbo-Golfo. Ĝi ludas gravan rolon por ekspluati la petrolo riĉfonton en la malprofunda kaj ekstreme malprofunda maroj ĉe la kontinentbreto de orienta Ĉinio.

En la lastaj jaroj, precipe de post 1992, bonaj informoj ofte aŭdiĝis de Chengdao-Petrolkampo. Oni sinsekve boris 8 putojn ĉiu kun taga produktokvanto de pli ol cent tunoj da nafto, tiel plivastiĝis la konata petrolohava areo, kreskis la konata geologia rezervokvanto.

Februare de 1993, laboristoj de la Platformo n-ro 5 trovis riĉan petrolo fluon en la mezozoika stratumo, oni uzis 15-milimetran ole-ŝprucigilon en la produktado, dank' al la trovo,

Nova oleputo

la konata olea rezervokvanto de Petrolkampo Chengdao pliiĝis je 10 000 000 tunoj. Vicĉefingeni-ero de Petrolkampo Shengli kaj respondeculo de la ekspluatado, s-ro Wei Xueyi (Ŭej Ŝjueji) diris, ke estis historia ŝanĝiĝo, ke oni ne nur prospektoras la riĉfonton de malprofunda maro, sed ankaŭ ekspluatas ĝin. Chengdao ŝarĝos sin per 30% de la pliproduktata oleo de Shengli-Petrolkampo. Ĝi ludos gravan rolon en la disvolviĝo de la petrolo industrio en orienta Ĉinio. Tamen pro manko de kapitalo, la disvolviĝo estos limigita. En 1993, en Chengdao ekfunkciis 11 novaj putoj, la nove trovita olea rezervokvanto estis 20 000 000-30 000 000 tunoj. Nun la jara olea produktokvanto de Chengdao atingis 100 000 tunojn kaj atingos 300 000 tunojn en 1994. Por realigi la celon, oni konstruis malgrandajn simplajn platformojn, starigis novan nafeltiran establajaron en la Puto Shengxin n-ro 3. Nun ili fido-plene iras sur la nova vojo de nafto-ekspluato en la malprofundaj maroj. ■



Entrepreneoj de kvar fratoj

ANTAŬ dek jaroj, post diplomitiĝo el alta lernejo, Liu Yongyan (Liŭ Jongjan) kaj liaj tri fratoj kune revenis al sia hejmloko en la ĉirkaŭurbo de Chengdu, Sichuan-provinco, Ĉinio, kaj fondis malgrandan entreprenon de brutonutraĵo per 1 000 juanoj kolektitaj el vendado de sia familia havaĵo. Nun ĝi havas sub si 17 filiojn, kun jara produktopovo de miliono da tunoj da brutonutraĵo kaj jara produktovaloro de 1.5 miliardoj da juanoj. Tiel ĝi jam fariĝis grupokompanio kun fiksa kapitalo de 290 milionoj da juanoj. Vizitinte ilian grupon Espero, iu fakulo el vizitgrupo de la Monda Banko diris: "Tre malofta rapideco de la disvolviĝo!"

NOVTIPAJ KAMPARANOJ

Antaŭ pli ol dek jaroj, kiam ekpraktikiĝis la respondeca sistemo de laŭkontrakta produktado en la ĉina kamparo, malriĉe vivis la kamparanoj en Gujia (Gugĵa)-vilaĝo de Xinjin (Ŝingĵin)-gubernio, la hejmloko de la fratoj Liu. Tamen en reformado de la ekonomia sistemo en la kamparo la fratoj sentis, ke jam venis la historia ŝanco reformi la fizionomion de la hejmloko. Tial ili rezignis la ŝancon labori en grandaj urboj kaj decidis hejmenreveni por fariĝi kamparanoj kaj fondi vilaĝajn entreprenojn.

Malfacile estas komenci novan aferon. Antaŭ ĉio ili devis

havigi al si monon. La fratoj vendis siajn havaĵojn, kiaj bicikloj kaj brakhorloĝoj, kaj per tio kolektis 1 000 juanojn.

Ili bredis koturnojn kaj raskokojn. Tamen, pro manko de sperto ili malsukcesis. Ili ne deprimiĝis, sed daŭrigis sian bredadon de koturnoj.

La pliaĝaj fratoj Liu Yongyan kaj Liu Yongli estas fakuloj pri elektroniko. Ili uzas komputeron en nutraĵa miksado kaj elektado de bonrasaj specioj. Uzante siajn agronomiajn kaj brutobredajn sciojn, la aliaj fratoj Liu Yongmei kaj Liu Yonghao elpensis la ekologian cirkulan metodon bredi porkojn per fekaĵo de koturnoj, fiŝojn per fekaĵo de porkoj kaj koturnojn per pulvoro de fiŝoj. La ovoj de iliaj breditaj koturnoj havis grandan debiton, ĉar la produktokosto de koturna ovo estis preskaŭ same granda, kiel tiu de kokovo. En 1988 la Yuxin (Juŝin)-a Bonrasa Bredejo

de Koturnoj, fondita de la kvar fratoj, produktis 150 000 koturnajn ovojn. Helpe de la fratoj, la gubernio disvolvis la koturnan bredadon. Nun la gubernio bredas tri milionojn da koturnoj, kun jara produktovaloro de cent milionoj da juanoj, kaj fariĝis unu el la plej grandaj produktetoj de koturnoj en Ĉinio. Kaj la kapitalo de la fratoj kreskis de 1 000 al dek milionoj da juanoj.

"BRUTONUTRAĴA REĜO"

De la fino de la 80-aj jaroj ĝis la komenco de la 90-aj jaroj, radikale ŝanĝiĝis la strukturo kaj vojo de la tradicia brutobredado en la ĉina kamparo, kiuj ekzistis milojn da jaroj. La kaŭzo kuŝis en importado de brutonutraĵo, pli multekosta ol biskvito, sed tre bonvena al ĉinaj kamparanoj pro tio, ke per malmulta nutraĵo oni povas rapidigi la kreskadon de porko kaj faciligi al si la bredadon. Statistiko diras, ke ĝis 1990 Ĉinio havas 25 entreprenojn de

La fratoj Liu en laborado



brutonutraĵo, investitajn kune de Ĉinio kaj aliaj landoj. Iu translanda financa grupo jare gajnis 600 milionojn da juanoj en Ĉinio, dank' al vendado de brutonutraĵo.

Pro tio multe da ĉinaj entreprenoj de brutonutraĵo apenaŭ povas vivi.

En la konkurenco pri brutonutraĵo la fratoj sukcese kaptis la ŝancon.

Post kiam ili riĉiĝis pro bredado de koturnoj, ili antaŭ ĉio investis por esplori nutraĵon de porkoj. Ili elspezis du milionojn da juanoj kaj fondis la instituton Espero, invitis pli ol 20 fakulojn kaj profesorojn kaj kontaktiĝis kun alilandaj organizaĵoj por kolekti informojn de nova brutonutraĵo.

La fratoj faris enketon en la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj, Pollando, Aŭstralio, Germanio kaj Hongkong por lerni de ili avangardajn sciencojn kaj teknikojn. Ili ankaŭ invitis en- kaj eksterlandajn fakulojn viziti iliajn entreprenojn.

En aliaj landoj brutonutraĵo entenas la elementon aminoacido, tamen en Ĉinio ne estas fabriko produktanta tiuspecan brutonutraĵon, tial la fratoj aĉetis aminoacidon por produkti brutonutraĵon.

Por la nutraĵo de novspeciaj

suĉporkidoj fiŝpulvoro estas nemankigebla, tamen la kvalito de la fiŝpulvoro produktita de Ĉinio ne estas kontentiga. La fratoj pensis, ĉu sekigitaj silkraŭpoj povas anstataŭi fiŝpulvoron. Post foja kaj refoja eksperimentoj ili sukcesis en tio.

Ili disponigis sian novan brutonutraĵon al multaj kamparanoj. Post provado ili trovis, ke la produktaĵoj povas rivali kun la importita.

Poste, ili komencis industriigi la produktadon de grajna brutonutraĵo. Post reformado de la aĉetita ĉefmaŝino ili povis produkti ĉiutage 100 tunojn da grajna brutonutraĵo por porkido. Post nelonge ili havigis al si la duan kompletan ekipaĵon. En januaro de 1990 la vendkvanto de la brutonutraĵo atingis 4 000 tunojn kaj okupis la unuan lokon tiurilate en la provincoj Sichuan, Yunnan kaj Guizhou (Gujĝou) de sudokcidenta Ĉinio. Iom poste, la fratoj komencis produkti kondensitan brutonutraĵon.

La kondensita brutonutraĵo havis grandan debiton en la tri provincoj kaj en 1990 ĝia vendkvanto atingis 60 000 tunojn.

LA TRIA ŜANCO

En la printempo de 1992 la fratoj produktis pli ol 30 specojn da brutonutraĵoj, finis la duaper-

iodan konstruadon de sia fabriko, investis 10 milionojn da juanoj por konstrui la Limigitan Kompanion Espero de Brutonutraĵo en Chongqing de Sichuan-provinco kaj havis 1 300 vendejojn en la tuta lando.

La vendkvanto de la brutonutraĵo en kvar sinsekvaj jaroj okupis la unuan lokon en sudokcidenta Ĉinio. Kiel privata entreprenoj la kompanio enprenis en sin du ŝtatajn kaj kolektivajn entreprenojn en la lastaj jaroj kaj fondis filion en Ŝanhajo, Henan, Yunnan, Jiangxi (Ĝjangŝji), Hunan, Hainan k.a. Nun la grupo Espero jam enviciĝas inter la dek fortaj privataj scienc-teknikaj entreprenoj de Ĉinio kaj estas difinita kiel modela entreprenoj.

La grupo Espero disvolviĝas kun rapideco eksterordinara. Ĝiaj filioj dislokiĝas jam en kampoj de domproprietoj, manĝaĵo, arkitekturo kaj elektroniko. En Xinjin-gubernio, kie loĝas la kvar fratoj, la urbo de privata ekonomio, kiu konsistas el la kvartaloj industria, komerca kaj loĝada, jam havas sian rudimentan formon.

En la lastaj jaroj entreprenistoj de Japanio, Singapuro, Usono, Kanado, Hongkong, Taiwan kaj aliaj dekelkaj landoj kaj regionoj venis trakti kun la fratoj pri kunlaboro. La urbestro de Niagara de Usono invitis ilin funkciigi fabrikon en Usono. En 1993 ili fondis la unuan kompanion de manĝaĵoj en Xinjin-gubernio, investitan kune de Ĉinio kaj Usono.

Antaŭ kelkaj jaroj la fratoj kolektis pli ol milionon da juanoj kaj starigis fonduson kaj stipendion por konstrui ŝoseojn, disvolvi edukan aferon kaj helpi vilaĝajn entreprenojn. En Gujiavilaĝo 70% de la loĝantoj okupiĝas pri brutobredado, transportado, vendado kaj produktado de krudmaterialoj por la grupo Espero. Per scienco kaj tekniko riĉiĝas sin la tuta vilaĝo. ■

Brutonutraĵo kun marko Espero transportata al aliaj lokoj





La aŭtoro (maldekstre) kaj esperantistetoj de Hangzhou

ESPERANTO!

Mi ne estas vojaĝisto, tamen min ĉarmegas la proverbo “Legu dek mil librojn kaj iru dek mil liojn (unu lio = 0.5 km).” Mi pasigis miajn 70 jarojn plejparte en Pekino, kaj kiam prezentiĝas ŝanco fari vojaĝon, mi volas foresti de ĝi por akiri iom da scio. Mi kaj s-ro Shen Chengru, vicprezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, ricevis inviton de la Esperanta Asocio de Huangyan (Hüangjan) por ĉeesti simpozion pri sciencoj kaj teknikoj en Esperanto de la 13-a ĝis la 16-a de nov. 1993.

“Finfine vi alvenis!” ĝoje min akceptis s-ro Shen en la kupeo. “Mi timis, ke vi ne kaptos la trajnon pro trafika obstrukco.”

“Hieraŭ posttagmeze, min subite atakis febro de 38°C. Feliĉe ĝi paciĝis kun mi frumatene, sekve mi...”

Mi lokis mian valizon kaj mansakon kaj komencis babilu kun li en Esperanto. Ni interŝanĝis informojn pri la vojoj kaj lokoj kaj ankaŭ pri la simpozio, kiu estas la unua en ĉina gubernia urbo.

“Pardonon! En kiu lingvo vi interparolas?” demandis nin sinjorino en nia kupeo. Ŝi aspektis kiel mezaĝa intelektulino.

“En Esperanto,” mi diris.

“Esperanto! Mi aŭdis pri Esperanto. Mi tre ŝatas lerni lingvojn. Mi lernis la anglan, rusan kaj japanan. Mi ne konas Esperanton. Kia ĝi estas? Kia estas ĝia estonteco?”

Mi pensis: Jen bona ŝanco por propagandi nian lingvon! Kiel ni varbu ŝin dum la kunvojaĝo?

Kvankam iom malforta pro fastado dum 28 horoj pro febro, mi klopodis respondi al siaj demandoj kaj kontentigi ŝian scivolemon kaj eĉ rakontis pri la bonkora doktoro Zamenhof. Ŝi diris, ke ŝi estas kuracistino. S-ro Shen tuj donacis al ŝi ekzempleron de sia “Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj”. Ŝi tuj komencis ĝin foliumi kaj ĝoje rimarkis plurajn vortojn similajn al anglaj radikoj. Kiam la kuracistino demandis nin pri lernebleco de la lingvo, ni donis al ŝi necesajn informojn. Do kun plezuro ni pasigis 18 horojn en la vagono pro konatiĝo kun simpatianto de Esperanto.

VOĈO DE E-ISTOJ

Vojaĝo al suda Ĉinio

de LAŬLUM

DU PONTEGOJ — FIERINDAĴOJ DE ŜANHAJO

Alveninte al Ŝanhajo en la sekvanta mateno, ni tuj ricevis aŭtobusajn biletojn por Huangyan. Post manĝeto mi iom refreŝiĝis kaj tre deziris pririgardi la urbon, kiun mi ne vidis dum 5 jaroj. Sed ni restos en la urbego nur 8 horojn. Kion ni pririgardu? Oni konsilis, ke ni vizitu la novan stajan Nanpu-pontegon, kiu okupas la trian lokon en la mondo.

Tuj ni ekveturis per trolebuso n-ro 18. Kiam ni demandis la konduktorinon pri la ĝusta haltejo por nia vizito al Nanpu-pontego, ŝi diris kun bedaŭro, ke ni devus elbusiĝi ĉe la trapasita haltejo, piediri al turego kaj leviĝi per lifto al la planko de la pontego por ĝui ĝian panoramon. Tiam junulo nin demandis, ĉu ni ne volas pririgardi la nove konstruitan Yangpu-pontegon.

“Ĝi estas la unua en la mondo!” diris fiere la helpema junulo.

Tuj aliaj kunveturantoj certigis lian aserton kaj konsilis, ke ni rigardu ĝin. Dum en miaj oreloj laŭtis iliaj vortoj, mia rigardo kaptis grandiozan bildon de la helica alkonduka parto de Nanpu-pontego kaj ŝtalaj stajoj, sur kiuj pendis la pontoplanko. Kiam mi demandis min, ĉu mi leviĝis en la aeron laŭ la bela helicego ĉe la fino de la pontego, la trolebuso jam finis la traveturon kaj haltis ĉe la alia fino de la pontego.

Ni elbusiĝis kaj ĉirkaŭrigardis por trovi la haltejon de la buso kaj veturi al Yangpu-pontego, kiam alrapidis al ni la helpema junulo. Li diris, ke ni ne bedaŭru la trapason de Nangpu-pontego.

“Yangpu-pontego, pli grandioza kaj pli rigardinda!” li certigis. “Vi ŝparis 5 juanojn por pagi la liftolevon de Yangpu-pontego kaj promenante ĝui birdrigardon de novaj konstruoj de nia urbo.”

Mi kortuŝiĝis de lia helpemo kaj el lia parolo mi povis percepti fierecon de mastro. Dank helpon de aliaj kunveturantoj, ni facile alvenis sub unu el la turegoj de Yangpu-pontego kaj per lifto leviĝis sur ĝian plankon sufiĉe larĝan por 6 kamionoj krom la trotuaroj larĝaj po du metroj. Nemirinde, ke amasoj da rigardantoj preskaŭ plenigis la trotuarojn kaj multaj sin fotadis, malgraŭ

nubozo, ĉar la liftobileteto informis nin, ke trafikado tra la pontego komenciĝis nur en oktobro. Por tiu giganta ponto pendanta per 256 stajoj sur 2 kolonegoj 208 metrojn altaj, la heroaj konstruistoj penlaboregis 29 monatojn. Mi rimarkis, ke la kablinoj kun diametro de pli ol 10 centimetroj portas fabrikajn markojn de Hudongŝipfarejo. La pontoplanko impresis min kiel kordoj de kolosa muzikilo. Admirante tiun enorman instrumenton, mi ekkomprenis pli bone la fieron de la helpemaj ŝanhajanoj. Ili ne povus ne fieri pri tiu nova konstruo okupanta la unuan lokon en la mondo.

Mi informiĝis ankaŭ, ke Ŝanhajo jam havas sian metroon kaj tunelojn interligantajn la bordojn de Huangpu-rivero.

NOKTA VOJO ILUMINITA PER LAMPIONOJ

Nia aŭtobuso devas ekveturi de Ŝanhajo je duono post la 16-a kaj ĝi trapasos la urbon Hangzhou, faman pro sia belega Okcidenta Lago kaj la proverbo "Supre la Paradizo sur la ĉielo, sube Suzhou kaj Hangzhou sur la tero".

Nia buso estas ekipita per 24 litseĝoj en 12 paroj. Mia sidloko troviĝis ĉe fenestro, mi povis klare vidi ĉion preterpasatan. Kiam nia buso forlasis la urbegon, mi tuj rimarkis, ke la trairata ŝoseo estas ekipita per fosforeskaj vojmontriloj kaj signaloj.

"Ni jam estas ekster Ŝanhajo," mi rimarkigis Shen. De tempo al tempo mi vidis en ambaŭ flankoj de la ŝoseo izolajn dometojn iluminatajn per lampionoj. Mi kredis, ke ili estas loĝejoj de kamparanoj.

"Maljuna sinjoro, ĉu vi venis de nordo?" min demandis junulo ĉ. 20-jara, duonkuŝante sur apuda litseĝo.

"Jes, el Pekino. Kaj vi?" mi montris similan interesiĝon.

"El Huangyan. Kien vi veturas?"

"Al Huangyan."

"Por partopreni la Mandarinan Festivalon? Ĝi eble jam venas al la fino, ĝi komenciĝis en la sepa kaj hodiaŭ jam la deknua."

"Ne por tio. Pro kio vi vojaĝas?"

"Mi direktas fabrikon de plastaĵoj en Huangyan kaj veturis al Ŝanhajo por negoco."

"Tiel juna kaj jam direktas fabrikon! Ĉu facile prosperas via entrepreno?"

"Ne tiel facile. Intensas konkurenco. Bonvolu min helpi per utilaj informoj."

"Ĉu mi, laiko en komerco, povus vin helpi?" mi replikis.

"Kial ne? Mi vidas, ke vi estas persono erudicia, bonvolu doni vian konsilon al verda entreprenisto. Mi povis apenaŭ fini mian studon mezlernejan kaj jam estas en la komerca tajdo. Vizitu mian fabrikon en Huangyan!"

Mi denove turnis miajn okulojn al la iluminataj dometoj flanke de la ŝoseo. Subite miaj okuloj kaptis sufiĉe grandan anonctabulon kun la vortoj "HALTU

KAJ MANĜU!" Mi tuj komprenis, ke la iluminataj domoj estas tavernoj por la noktaj veturantoj. Kial do tiel multe da tavernoj laŭlonge de la ŝoseo?

Ion post la 19-a, nia buso haltis ĉe taverno. Por havi konkretan ideon pri la trafika intenseco de la nokta ŝoseo, mi kalkulis la trapasantajn aŭtojn kaj nombris 110 en 10 minutoj.

HUANGYAN NE NUR DOLĈAS SED ANKAŬ SORĈAS

Nia buso alvenis al Huangyan je la sesa — 2 horojn ni perdis pro trafika obstrukco. Jam sereniĝis, kaj tra la hela aŭroro mi rimarkis montodeklivojn kovritajn de verdaj arbaroj kun oranĝaj punktoj. Mi miris, ke la mandarinaroj ankoraŭ plenas je fruktoj, kvankam en Pekino aĉeteblis "mielaj mandarinoj de Huangyan" jam antaŭ longe. Pro siaj famaj fruktoj, kredeble Huangyan kun historio de miloj da jaroj estas urbo nemalriĉa. Min surprizis ĝiaj larĝaj stratoj kun modernaj magazenoj, hoteloj kaj multetaĝaj loĝdomoj.

En la 12-a ni havis liberan tagon kaj povis promeni tra stratoj proksime de nia hotelo kaj viziti la Parkon kun Naŭ Montpintoj. Dum nia plezura promenado mi interbabilis Esperante kun s-roj Shen kaj Zhao, prezidanto de la Scienc-teknika Komitato de la Zhejiang-a E-Asocio.

"El kiu lando ili..." demandis s-ron Zhao diketa sinjorino kun oraj orelingoj kaj ora kolĉeno.

"El Pekino. Ne fremduloj. Ni parolas en Esperanto!" klarigis Zhao.

"Esperanto? Tiel flue vi parolas kaj mi kredis, ke vi estas fremdlandaj turistoj. Se vi povas tiel flue paroli fremdan lingvon, certe vi ofte vojaĝas eksterlande. Jen mia edzo, ŝoforo, li multe veturis, sed neniam vizitis fremdan landon!"

Mi turnis mian rigardon al la viro kaj konstatis, ke li portas brunetan ledjakon kaj elegantan pantalonon el blua serĝo. Li staris ĉe fortika knabeto kaj blankhara maljunulino.

"Jen miaj patrino kaj fileto," diris la viro. "Ni povas ekskursi nur en loka parko, kvankam mono al ni ne mankas."

"Ankaŭ vi povas vojaĝi eksterlanden, se nur vi volas," mi prenis la parolan temon por daŭrigi la interbabilon.

"Ne, ne plaĉas al mi vagadi kiel surdamutulo inter fremduloj. Mi scipovas neniun fremdan lingvon!" diris la viro.


Jen prezentiĝis alia ŝanco por mi kaj Shen propagandi Esperanton. Ni kuraĝigis la ŝoforon lerni Esperanton, ke ĝi konatigu lin al alilandaj ŝoforoj kaj ebligu al li fari vojaĝon eksterlande.

"Kiom da mono necesas por tio?" demandis la edzino kun interesiĝo, "Ĉu sufiĉus kvindek mil juanoj por vojaĝi alilanden?"

Nia konatiĝo kun la ŝofora familio impresis min profunde.

Dum la Esp-a simpozio kun 58 partoprenantoj, mi ne

Nekrologo



S-ro Ye Laishi (Je Lajŝi), honora prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo kaj honora membro de Universala Esperanto-Asocio, forpasis pro kancero en Pekino la 2-an de februaro, 1994, en la aĝo de 84 jaroj.

S-ro Ye Laishi (Esperanta nomo Ĵelezo) esperantistiĝis en 1927. Dum pli ol 60 jaroj li dediĉis multe da tempo kaj energio al diskonigo kaj disvastigo de Esperanto en Ĉinio. Li redaktis la E-gazetojn "La Mondo", "Ĉinio Hurlas" kaj "Heroldo de Ĉinio", fondis korespondan Esperanto-lernejon kaj funkciis kiel vicprezidanto kaj aganta prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, prezidanto de LKK de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto kaj estis unu el la iniciatintoj de la influhava societo de Ĉinio "Amikoj de Esperanto". Li faris multe da klopodoj por plibonigi la revuon "El Popola Ĉinio" kaj Esperanto-elsendojn de Ĉina Radio Internacia, por eldoni Esperanto-librojn kaj por kulturi junajn esperantistojn. Pro siaj elstaraj kontribuoj al la Esperanto-movado, s-ro Ye Laishi estis ne nur amata de la ĉina esperantistaro, sed ankaŭ respektata en la internacia Esperantio. Ni sentas grandan malĝojon pro la forpaso de s-ro Ye Laishi.

La Red.

nur aŭdis 8 el la 32 prelegoj pri medicino, farmakologio, kemio, matematiko kaj pedagogio, sed ankaŭ informiĝis, ke la urbo Huangyan kun areo de 1 262 kvadrataj km. kaj 920 000 loĝantoj nun jam havas pli ol 4 000 industriajn entreprenojn. Ĝi famiĝis kiel "Regno de Fajnaj Kemiaĵoj" kaj "Urbo de Muldiloj". La industria produkt valoro de la urbo estis 2.234 miliardoj da juanoj en 1990, sed tiu de la unuaj 10 monatoj de 1993 jam atingis 6.38 miliardojn da juanoj. En ĉi jaro ĝi jam eksportis varojn kun totala valoro de 1.8 miliardoj da juanoj. Funkcias en la urbo pli ol 200 diversaj bazaroj. Ĝi fariĝis unu el la dek plej fortaj gubernioj en Zhejiang-provinco kaj unu el la 100 plej fortaj gubernioj de la lando.

Dum la tagoj kaj vesperoj en Huangyan, mi akiris sciojn kaj konatiĝis kun novaj amikoj. Mi admiris entuziasmon de junaj samideanoj, mi vidis ilian lernemon dum mia demonstrado pri instrua metodo de Esperanto kaj ankaŭ eksciis, ke Huangyan ne nur dolĉas, sed ankaŭ sorĉas per siaj industrioj kaj komerco.

BURĜONOJ EN ANTIKVAJ URBOJ

En Huangyan mi informiĝis, ke en Hangzhou funkcias E-rondo en elementa lernejo sub gvido de s-ro Li Zhongmin, kaj mi volis viziti la urbon; kaj s-ro Shen volis trakti kun tieaj fabrikistoj kaj komercistoj pri okazigo de internacia foiro per Esperanto. Sekve ni veturis kune per aŭtobuso, la 17-an de novembro, al tiu antikva urbo. Mi ne miris, ke ĉiuj urboj trapasataj estas modernigantaj, ĉar mi jam vidis la ekzemplojn de Huangyan. Sed aparte okulfrapan bildon prezentis la juniĝanta antikva urbo Shaoxing (Ŝaŭŝing), la hejmurbo de nia granda verkisto s-ro Lusin. Ankaŭ en ĝi brilas modernaj domegoj, kvankam oni intence konservas ĝian antikvan

parton kun akvostratetoj kiel en Suzhou. Aparte menciindaj estas la benzinstacioj kun brilkoloraj tegmentoj kaj muroj, kiuj aspektas kiel konstruoj en fabeloj.

En Hangzhou mi vizitis la esperantistetan grupon, akompanate de s-ro Li Zhongmin. Li montris al mi leterojn, fotojn kaj desegnaĵojn alsenditajn de geknaboj kaj instruistoj el Japanio, Usono, Francio, Rusio kaj Kroatio. Min salutis ĉ. 20 geknaboj en Esperanto kaj mi parolis al ili pri mia neforgesebla vizito al Esperanta rondo en japana elementa lernejo Nakajima en Ŝizuoka antaŭ 11 jaroj kaj deziris al ili progreson kaj sukcesojn. Post la kunsido, knabeto donacis al mi ŝlosilringon kun globkrajono kaj knabineto petis sian patro-ŝoforon veturigi min al la hotelo.

Poste mi trajne veturis al la antikva urbo Zhenjiang ĉe Yangzi-rivero. Ankaŭ en tiu urbo kun historio de jarmiloj troviĝas E-kurso en la Elementa Lernejo ĉe Baotalu. Tie mi restis preskaŭ unu tutan semajnon, intervidiĝis kun lokaj esperantistoj kaj vizitis dufoje la Esperantan kurson en la elementa lernejo akompanate de ĝia gvidantino Neĝeta. La loka televida stacio intervjuis ŝin, ŝian kurson, gvidanton de la lernejo kaj ankaŭ min. Profitante tiun okazon mi parolis pri la graveco de instruo de Esperanto al la geknaboj. La lernejestrino kaj estro de la eduka buroo de la urbo multe laŭdis Neĝeta pro ŝia sindona laborado por tiu grupo. Ankaŭ tiu rondo komencis kontaktiĝi kun alilandaj esperantistetoj.

Mi finis mian vojaĝon kaj revenis al Pekino en la 26-a de nov. Mi diru al vi, ke min plej interesis la du geknabaj rondoj en elementaj lernejoj, ĉar ili estas burĝonoj de nia movado. Ili prosperu kune kun siaj juniĝantaj urboj. ■

ESP-NOVAĴOJ

● La unuan de februaro 1994 la Ĉina Esperanto-Ligo, Pekina Esperanto-Asocio kaj Ĉina Junulara Esperanto-Asocio kune okazigis amuzkunvenon en Pekino por festi la Printempan Feston de Ĉinio.

● Sub la aŭspicioj de la Chengde-a Esperanto-Asocio kaj la Chengde-a Medicina Instituto, la Junulara Esperanto-Asocio de la Chengde-a Medicina Instituto fondigis la 21-an de decembro 1993.

● La 12-an de decembro 1993 la Taijiang(Tajĝjang)-a Esperanto-Asocio de Fuzhou okazigis kunvenon de siaj konsilantoj memore al la 134-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof en la Fuzhou-a Esperanto-Lernejo.

● La revuo "Verdsteloj apud la Rivero Yalu", organo de la Dandong-a Esperanto-Asocio de Liaoning-provinco, estis lanĉita la unuan de januaro 1994.

● La Unua Internacia Kultura kaj Turisma Semajno okazis en Sant Cugat de Hispanio. Pli ol 60 personoj kaj famaj verkistoj el 12 landoj partoprenis en tiu aranĝo.

● La Dua Mondkongreso de Esperantistoj-Handikapuloj okazos en Kladno de la Ĉeĥa Respubliko de la 9-a ĝis la 16-a de julio 1994.

● La 20-a Internacia Semajno de Esperanto okazos de la 3-a ĝis



Esperanto-Domo en Irlando

la 10-a de septembro 1994 en la havenurbo Sète ĉe mediteranea marbordo. Dum la semajno oni funkciigos diversnivelajn E-kursojn kaj aranĝos interesajn aktivadojn.

● La Tutmonda Vegetarana Asocio, kiu eldonas la gazeton Esperantista Vegetarano, havas novan reprezentanton s-ro Walter KLAG en Aŭstrio.

● En Irlando, ekde la nuna jaro, okazos "Duonmonato Esperantista" en la unuaj du semajnoj de julio. Dum tiu periodo fremdaj esperantistoj estos aparte bonvenaj, kaj ili havos la eblecon ne nur viziti la belan landon, sed ankaŭ renkontiĝi kaj ferii en la bieno de s-ro C. Fettes, prezidanto de EAI.

● La Dua Kolombia Esperanta Tago okazis en Medeĥino la 13-an kaj 14-an de novembro 1993. La Esperanta Tago enhavis prelegojn, artajn programerojn, ekspozicion kaj vendadon de esperantaĵoj.

● La unua en historio de Esperanto-movado plensence Esperanta katedro estis fondita en 1992 en la Akademia Centro de administro, entreprenado kaj juro en Slavjansk, Ukrainio. Nun laboras en la katedro dek personoj: tri profesoroj, tri docentoj kaj kvar sentitolaj instruistoj. Ili lektias Esperanton al tri mil studentoj de ĉeesta lernado kaj al sep mil studentoj de koresponda lernado. La studentoj aŭskultas teorian kurson kaj havas legan kaj parolan praktikon. Por la studentoj de la Akademia Centro estas eldonata la lernilo "Esperanto en 9 lecionoj". La katedranoj redaktas kaj eldonas la bultenon "Esperanto-Centro Informas".

● La Poem-Domo de Esperanto (PDE) aranĝas konkurson pri la simbolo de PDE. La slogano de PDE estas: Kandel, Floro kaj Papilio. Ĉiuj esperantistoj povas partopreni en la konkurso kaj sendi sian simbolon, kun detaloj pri la desegno kaj privataj detaloj. PDE elektos tri simbolojn kaj la desegnintoj ricevos memoraĵojn.

La Unua Internacia Kultura kaj Turisma Semajno



En la Dua Kolombia Esperanta Tago



“Paŝtisto kaj Feino”

de LIU CAISHENG

Mia amiko donacis al mi la Esperantan libreton “Paŝtisto kaj Feino”, kolekton de popularaj rakontoj. Mi tra legis tiun ĉi 68-paĝan eldonaĵon en unu tago kaj estis profunde impresita de la belaj intrigoj.

La libreto estis eldonita en 1990 de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, kompilita de Zheng Zhenjie (Ĝeng Ĝengje) kaj tradukita de Li Baofa kaj Yao Baoyin. Formato: 11 × 17.8 cm. Prezo: 1.60 USD. Ĝi konsistas el dek popularaj rakontoj, inter kiuj kvar estas koreaj kaj du hanaj. Kaj en ĝi estas ankaŭ la rakontoj manĉura, oroĉuna, daura kaj mongola.

“Paŝtisto kaj Feino” estas la unua rakonto de la libreto. Ĝi rakontas, ke antaŭ tre tre longe, iu juna bonkora paŝtisto savis malgrandan cervon persekutatan de ĉasisto. Fakte, la cervo servis en la Ĉiela Palaco. Por danki sian savinton ĝi diris al la knabo, ke la sep feinoj de la Ĉiela Palaco flugos al Tianchi-lago ĉe Changbaimontaro por sin bani. Tiutage, se la paŝtisto ŝtele forprenos la veston de la sepa feino, la plej bela el ili, ŝi do edziniĝos al la knabo. Li faris tion laŭ la konsilo de la cervo kaj la sepa feino edziniĝis al li. Ŝi naksis du infanojn. Tri jarojn kaj tri monatojn post la geedziĝo la

sepa feino ŝtele forflugis al la Ĉiela Palaco por festi la naskiĝtagon de sia patro la Ĉiela Imperiestro, kunportante siajn du infanojn. Laŭ la konsilo de la cervo la paŝtisto kuris al la Ĉiela Palaco por vivi kune kun siaj edzino kaj infanoj. La Ĉiela Imperiestro, malkontenta je la geedziĝo de sia filino kaj karnulo, intencis disigi ilin. Li ordonis al la paŝtisto iri al la Muso-regno por fari taskon neplenumeban por la karnuloj. Se la paŝtisto ne povos plenumi la taskon, li estos forpelita el la Ĉiela Palaco. Fidela al la amo, la paŝtisto plenumis la taskon spite grandan danĝeron. La Ĉiela Imperiestro devigite konsentis la geedziĝon de la filino kaj la paŝtisto. Fine, la paŝtisto kune kun siaj edzino kaj infanoj revenis al sia hejmo proksime de Tianchilago kaj vivis feliĉan vivon.

La rakontoj en la libreto temas ĉefe pri amo. La sincera amo inter Jinyu (Ĝinju) kaj Dalai donis la kortuŝan legendon pri la bela floro Jindalai (rododendro). Estas ja kortuŝaj la amo inter Daĉjo kaj princino Tintilo, amo inter Ajiĝaĉin kaj Melon-knabino kaj amo inter Zhang Shan kaj Oriolo.

La libreto prikantas la diligentecon kaj saĝon de laboru-

loj, kiaj paŝtisto, kamparano, ĉasisto kaj dungito. En la rakonto “Vesto el Cent Birdoj” la dungito kaj lia edzino saĝe batalas kontraŭ la reĝo. En “Fanfaronema Imperiestro” la ĉarpentisto sprite venkas la imperiestron. La rakontoj laŭdas bonkorecon kaj vipas perversecon. Tio montras la amon kaj malamon de la popolo. Iuj karakteriziĝas per evidentaj tragediaj koloroj, tamen ili kortuŝas la legantojn kaj vekas la malamon al la maljustaĵoj.

La intrigoj estas interesaj. La kreintoj multfoje uzis hiperbolon, komparon kaj personigon kaj la lingvo estas flua. Ili estas taŭgaj por komencantoj.

Kompreneble, ankaŭ la libreto havas sian mankon. Ekz., en “Princino Tintilo” oni nomas filinon de la princo “princino”. Kvankam tiu klarigo troveblas en PIV, mi tamen opinias, ke tio ne estas ĝusta kaj povas kaŭzi miskomprenon. Kial oni ne uzu la vorton “princidino”? Kaj krome, troviĝas en la libreto ankaŭ preseraroj.

La rakontoj originis senescepte en la Nordoriento de Ĉinio. Verŝajne, ili helpas la eksterlandajn legantojn koni la tieajn naciajn morojn. ■



POR KOMENCANTOJ

EKSTER malgranda urbo loĝis blinda maljunulino. Iun tagon ŝi venis al butiko de elektraĵinstalaĵoj, kunportante sian ŝparmonon. Tie ŝi petis la mastron de la butiko:

“Sinjoro, ĉu vi povus instali kelke da lampoj sur la strato antaŭ mia domo?”

La mastro miris kaj demandis ŝin: “S-ino, vi ne povas vidi, do kial vi bezonas lampojn?”

“Antaŭe mia loko estis preskaŭ dezerta kaj tre malmultaj preterpasis, kaj lampo ne estis necesa. Nun pli kaj pli multaj homoj preterpasis mian lokon, kaj mi jam havas sumon da ŝparmono, tial mi petas vin instali kelke da lampoj, por ke irado estu pli facila.”

La mastro estis kortuŝita kaj promesis instali lampojn je tre malalta prezo.

Lumo de blindulino

La informo pri la bonfaro de la blinda maljunulino tre rapide trakuris la urbeton.

Ĉiuj estis kortuŝitaj de ŝia bonkoreco kaj volonte oferis monon. Ili pensis en si: “Eĉ la blinda maljunulino voluntas helpi aliajn, kaj ni, havante bonan vidon, devas fari pli bone ol ŝi.”

La rezulto estis, ke la vojo estis ekipita per elektraĵlampoj kaj larĝigita, la ligna ponteto estis anstataŭigita per la betona, kaj la ligna dometo de la blindulino estis ŝanĝita en la brikan.

La blinda maljunulino ne atendis, ke ŝia malgranda bonfaro faris la malgrandan urbon pli hela kaj pli bela. ■



MEM PROVU

KIEL SENMAKULIGI POŝT-MARKOJN?

Por forigi flavajn makulojn sur poŝtmarkoj kaŭzitaĵojn de gluaĵo sur la dorsflanko, metu iomete da salo en varman bovinan lakton. Kiam la solvaĵo malvarmiĝas, trempu la poŝtmarkojn en ĝi por du horoj. Poste, elprenu, akve purigu kaj sekigu ilin, tiel malaperas la makuloj.

KIEL KONSERVI VIVAJN FIŜOJN?

Plado el viva fiŝo estas bongusta. Sen akvo fiŝo rapide mortas, ĉar en la okuloj de la fiŝo estas “mortlinio”, kiu rapide malaperas sen akvo. Se ŝir-

mi la okulojn de fiŝo per malseka tolaĵo aŭ papero, tio povas longigi la vivon de fiŝo je 4-5 horoj.

RETROIADO MILDIGAS LUMBALGION

Se oni estas atakata de sprono ĉe la talio kaj ne resaniĝas post fizioterapio kaj preno de medikamento, li provu sin ekzerci per retroirado kaj bona efiko venos post longtempa persistado.

KURACEFIKA RAFANO

Rafano entenas amelo-solvantan enzimon. Se vi suferas de misdigesto, manĝu iom da rafano, kiu helpas digestadon.

Rafano entenas abundon da

vitaminoj A kaj C, sanigaj al la supra spira kanalo. Ĝi entenas ankaŭ seninfektigilon. Se vi suferas de gorgo-doloro, vi povas manĝi iom da rafano por forigi la inflamon.

KOMBADO KURACAS HARKVAMOZON

Nemalmultaj suferas de harkvamozo, kiu netolereble jukigas. Kuracado per medikamento eble ne donas idealan efikon. Se paciento ĉiutage kombas al si la harojn du fojojn, ĉiu po tri minutoj en mateno kaj vespero, li povas eviti la suferon. Iuj suferantoj de neŭra kapdoloro pli-malpli resaniĝas post plurjara persistado.



Maljunulinoj en dommastrumado

En kokos

Teksto kaj fotoj de YAN JIN

Li-nacio estas unu el la ĉinaj nacimallimultoj, kun 890 000 loĝantoj. 90% el ili vivas en la Hainan-a Li- kaj Mjaŭ-nacia Aŭtonoma Subprovinco.

Li-oj okupiĝas ĉefe pri agrikultura produktado. La virinoj de la nacio lertas en ŝpinteksado kaj tinkturado. Ili portas freŝkolorajn kaj bele desegnitajn vestojn. Antaŭe li-oj loĝis en kabanoj pro malriĉeco kaj nun ili loĝas en novaj domoj.

Li-oj havas siajn proprajn lingvon kaj vivkutimojn pri manĝado, vestado kaj ceremonio de

Novaj domoj de li-oj



arbaro

geedziĝo kaj funebro. Ĉiuj li-oj lertas en kantado kaj dancado. Reciproka kantado estas amasa amuzado por ili. Kantado en malgranda skalo liberforme okazas ĉiam kaj ĉie, dum tiu en granda skalo — inter du grupoj da homoj, kiuj laŭvice kantas. La teksto estas improvizita. La kantado daŭras kelkajn horojn aŭ eĉ iom pli longe, ĝis la alia flanko ne povas trovi taŭgajn vortojn por kanti. La vivo de li-oj estas akompanata de reciproka kantado. Ĝi okazas ĉe ili en geedziĝa ceremonio, festotago kaj amafero inter gejunuloj.



Reciprokado de kanto



Ĉe nova elektroaparato

Transsaltado de bambustangoj, sporto ŝatata de li-aj junuloj



Nankino al internacia urbego

Teksto de **JI PING**

Fotoj de **MO BINGCHUN**

KIAM la rakontoj pri Yangzhou kaj Zhenjiang ankoraŭ viglis en mia memoro, nia ŝipo rapide veturigis min al Nankino, la ĉefurbo de Jianguo-provinco.

Nankino ekkonstruiĝis antaŭ 2 000 jaroj. En la ĉina historio dek regnoj prenis ĝin kiel sian ĉefurbon kaj nun en ĝi estas ankoraŭ multaj historiaj restaĵoj, kiaj la majestaj Maŭzoleoj de la Unua Imperiestro Zhu Yuanzhang (1368-1398 sur trono) de Ming-dinastio kaj D-ro Sun Yatsen (1866-1925), la granda pioniro de la ĉina demokratia revolucio, kaj ĉarmaj Xuanwu(Ŝĵuan'u)-lago, Mochou-lago kaj Linggu-temple.

Nankino, unu el la kvar centraj urboj en la baseno de Yangzi-rivero, iris eksterordinaran vojon en la longa historio. Tiu antikva kultura urbo

nun fariĝis moderna industria urbo. Nun ĝi paŝas al moderna internacia urbego.

SUPERECO DE LA URBO

Ĉinoj iam fieris pri la 6 762-metra Nankina Pontego super Yangzi-rivero, ĉar ĝi estis simbolo, ke ĉinoj povas konstrui grandan ponton per siaj propraj fortoj. Sed tiu pontego konstruita en la 60-aj jaroj apenaŭ povas elteni la nunan viglan trafikon: po ok minutoj trapasas la ponton du trajnoj en malsamaj direktoj. Ofte okazas, ke en pinthoroj longaj vicoj da aŭtoj atendas por trapasi la ponton. Se tiel, en kelkaj jaroj ĝi fariĝos obstrukco por la norda-suda trafiko en orienta Ĉinio. Pro tio konstrui la duan Nankinan Pontegon super Yangzi-rivero estas urĝega laboro.

Tio pruvis aliflanke, ke la urbo okupas gravan geografian pozicion.


Je mencio pri la geografia pozicio de Nankino en ekspluatado de la baseno de Yangzi-rivero, urbestro Wang Wulong diris al mi, ke Nankino estas la dua grava ekonomia urbo post Ŝanhajo el la 23 ekspluatataj urboj en la baseno de la rivero.

Ekspluati la basenon de Yangzi-rivero estas grava paŝo farita de Ĉinio en la pordomalfermo al aliaj landoj post la ekspluatado de la ĉemara regiono. Sed la baseno de Yangzi-rivero, malsama ol la ĉemara regiono, koncentre investita de la ŝtato, posedas trionon de la fiksa kapitalo kaj produktaĵoj de Ĉinio. Ĝi ludos gravan rolon en la profundigo de pordomalfermo al la landinterno kun Yangzi-rivero kiel la akso.

Ĉe Yangzi-rivero abunda je akvo, Nankino estas ideala loko por entrepreni kemian, feran kaj ŝtalan industriojn, kiuj grandkvante konsumas akvon. Pro tio, la tiea petrokemia industrio rapidege disvolviĝas. Nuntempe en Nankino estas la plej grandaj etilenaj, vitriolaj, ariltinkturaj kaj alkanbenzenaj instalaĵoj de Ĉinio. La produktokvanto de alkanbenzeno konsistigas 90% de la totala produktokvanto de Ĉinio kaj la jara naftorafina povo estas 10 milionoj da tunoj. La Yangzi-a Petrokemia Kompanio, Jinling-a Petrokemia Kompanio kaj Nankina Kemi-industria Kompanio estas grandaj modernaj entreprenoj.

La kemi-industria, elektronika kaj aŭta entreprenoj estas plej gravaj en Nankino kaj ilia produktovaloro konsistigas pli ol 60% de la totala industria produktovaloro de Nankino. Multaj el la 182 grandaj kaj mez-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE YANGZI-RIVERO





Sur la kajo de kontenera kompanio ĉe la Nankina Haveno, investita de Ĉinio kaj Usono Foto de **SHI JIUXIN**

grandaj entreprenoj de Nankino jam atingis la internacian nivelon kaj la jara interezo konsistigas 77% de tiu de la urbo.

Guste pro sia solida industria bazo kaj supereco de geografia pozicio, Nankino, kiel Ŝanhajo, en la ekspluatado de la baseno de Yangzrivero servas kiel ligilo inter multaj ĉirkaŭaj kaj ĉeriveraj urboj. Plene profitante siajn superecojn, Nankino sukcese faris interŝanĝon de regionaj fondusoj, materialoj, komercaĵoj, sciencoj kaj teknikoj. La Elektronika Grupo Pando, Nanchang-a Aviadilo-produkta Kompanio kaj Jiangxi-a Isuzu-grupo kune starigitaj jam fariĝis fame konataj industriaj entreprenoj-grupoj.

Kiel grava trafika centro, en Nankino funkcias fervojoj, ŝoseoj, akvojoj, aervojoj k.a. La Nankina Haveno, la plej granda eksterkomerca rivera haveno de Ĉinio, okupas la kvaran lokon de Ĉinio en ŝarĝ-malŝarĝa kvanto; la Fervojoj Tianjin-Pukou-a, Ŝanhaj-Nankina kaj Nankin-Ganzhou-a kuniĝas en la urbo; ŝoseoj atingas pli ol centon da urboj kaj gubernioj; kaj per aeraj linioj la urbo kunligiĝas kun ĉinaj grandaj urboj, inkl. de Hongkong.

Kiel unu el la ok telekomunikaj centroj de Ĉinio, Nankino havas telekomunan reton el ekspresa poŝto, speciala poŝto, mikroondo, kurtondo k.a., per kiu oni povas komunikiĝi kun diversaj partoj de Ĉinio kaj multaj landoj de la mondo.

En Nankino prosperas kulturo, estas multaj vidindejoj, laboras 320 000 sciencistoj kaj teknikistoj, funkcias pli ol 500 scienc-esploraj organizoj kaj 48 altlernejoj. Fame konata de la mondo, Nankino vaste kontaktiĝas kun aliaj landoj. Ĝi ĝemeliĝis kun ses alilandaj urboj. Iuj landoj kaj internaciaj organizoj starigis en Nankino pli ol 100 kulturajn kaj scienc-esplorajn fondaĵojn kaj firmaojn. Ĉiujare Nankino akceptas pli ol 300 000 turistojn el diversaj landoj kaj regionoj.

ALTIRI AL SI KONSORCIOJN

Observante la politikon de por-domalfermo, Nankino donas sian atenton ne nur al plibonigo de la hardmedio, sed ankaŭ al tiu de la softmedio. Dank' al tio, iuj alilandaj konsorcioj entreprenis tie grandajn projektojn responde al la geografia situo de la urbo, kio karakterizas

alilandan investon en Nankino.

Lastatempe oni komencis projekton de acetamino kun jara produktokvanto de 50 000 tunoj per 190 milionoj da usonaj dolaroj investitaj kune de brita kompanio-grupo, Aŭstria Fera kaj Ŝtala Kompanio kaj Nankino. Ĝi estas la plej granda kemi-industria entrepreno kune investita en Ĉinio. La projekto de sistemo de koloraj kineskopoj kaj ties kompletigaj pecoj, konstruita per 180 milionoj da usonaj dolaroj kune investitaj de Philips-Kompanio de Nederlando kaj Nankino, estas la plej granda el la elektronikaj entreprenoj kune investitaj en Ĉinio. Profitante de 170 milionoj da usonaj dolaroj investitaj de Italio, la Nankina Aŭta Fabriko, la plej granda produkteto de leĝeraj aŭtoj de Ĉinio, importis el Italio kompletan produktolinion de aŭtoj por havi jaran produktopovon de 100 000 leĝeraj aŭtoj kun marko IVECO.

Registaroj kaj konsorcioj de la evoluantaj landoj interesiĝas pri konstruado de grandaj fundamentaj instalaĵoj en kuna investado en Nankino. Nun Nankino konstruas aerodromon per monprunto el Britio, por ke la jara ŝarĝ-malŝarĝa kapablo de la Nankina Flughaveno kresku de la nunaj 300 000 hom-fojoj al tri milionoj da hom-fojoj; dank' al monprunto el Francio kaj Japanio, du kranakvaj fabrikoj estis rekonstruitaj kaj transdonitaj al uzado; la Huaneng-a Elektrejo, konstruita kunlabore kun Rusio, jam komencis doni elektron al Nankino. Ankaŭ la konstruado de ekspresa aŭtovojo, subtera fervojo kaj haveno en Nankino tre interesas eksterlandajn konsorciojn.

Por disvolvi novajn kaj altajn teknikojn kaj enkonduki eksterlandan kapitalon, en la pasintaj jaroj oni konstruis en Nankino scienc-teknikan straton kun longo de ok km., nankinan ekspluatatan kvartalon de novaj kaj altaj teknikoj, Pukou-an investan kvartalon por Taiwan-aj komercistoj kaj ekspluatatan kvartalon de nova haveno.

Por faciligi investadon al eksterlandaj entreprenistoj, Nankino starigis al ili kompletan da facilaj procedoj por sankcii la investon, ellaboris 50 leĝojn pri eksterlanda investado,



Nankino en panorama vido

speciale fondis konsultigan kompanion pri la investado kaj procesocentron por eksterlandaj entreprenistoj, invitis fakulojn el aliaj landoj kaj donis aliajn servojn. En Nankino multe prosperas la poreksporta ekonomio. Nur en la sep unuaj monatoj de 1993 la urbo permesis malfermi 830 entreprenojn, investitajn aŭ funkciigatajn kune de Ĉinio kaj alia

lando aŭ de la lasta mem, kun la totala kapitalo de ĉ. 3.5 miliardoj da usonaj dolaroj kaj la kapitalo de 1.7 miliardoj da usonaj dolaroj importita laŭ kontrakto. Ankaŭ la ekstera komerco kaj ekonomia kunlaboro kun aliaj landoj rapide disvolviĝis en Nankino, kiu funkciigis 43 entreprenojn en 21 landoj kaj regionoj.


GRANDA PLANO


S-ro Wang Wulong diris al mi, ke en la venontaj 10-20 jaroj Nankino senĉese kaj stabile disvolvos sian ekonomion kaj iom-post-iome disvolviĝos al internacia urbego. Kun novaj kaj altaj teknikoj kaj avangardaj sciencoj ĝi fariĝos moderna industria bazo kun aŭtaj, elektronikaj kaj

Nederlandaj studentoj (la dua kaj kvara de dekstre) praktikantaj en la kompanio Huafei



En la Limigita Kompanio Huafei de la Sistemo de Koloraj Kineskopoj





En telekomunika limigita kompanio kune investita de la grupo Pando kaj Svedio

kemi-industriaj produktoj kiel la ĉefaj; grava eksterakomerca haveno; ekonomia centro por aliaj landoj; centro de trafiko, telekomuniko, komerco, financo kaj informoj; kaj fama kultura urbo kaj turisma vidindejo.

Por atingi la supre menciitan celon, en la kuranta jarcento la totala



jara produktovaloro de la nacia ekonomio de Nankino atingos 81 miliardojn da juanoj, t.e., naŭoblo de tiu en 1980.

Por fariĝi internacia urbego Nankino pligrandigos la skalon de fundamenta konstruado. El ĉiuj projektoj la ĉefaj estas la nova aerodromo, Dua Nankina Pontego super Yangzi-

rivero kaj subtera fervojo. Krome, la Nankina Magistrato pligrandigos la urbon de 140 ĝis 243 kvadrataj kilometroj.

D-ro Sun Yatsen iam diris: "La disvolvigo de Nankino estos netaksebla." La faktoj tion pruvis. Kiel realigi la grandan planon? La nankinanoj faras ĉion eblan por la celo jam nun. ■

En la unua komercejo de Ĉinio por limperiodaj petrol-varoj en Nankino



De Interna Mongolio al Gansu

VIZITO AL INTERNA MONGOLIO

Stepo, ĉevaloj, blua ĉielo — tion mi imagis antaŭe pri Interna Mongolio. Nun mi scias pli bone. Ĝi estas multe pli ol tio.

La 30-an de septembro, t.e. la 15-an de la oka monato laŭ la ĉina lunkalendaro, tago de la ĉina lunfesto, mi frumatene atingis tre malvarman — kompare al Pekino — kaj ĵus vekigintan urbon Hohhot, kie nebulo ankoraŭ pendis super la stratoj. En la stacidomo atendis Li Sen, fama esperantisto kaj emerita fervojisto en Interna Mongolio. Lin akompanis Xiao Ke (Ŝjaŭ Ke) el Baotou, ankaŭ fervojisto kaj e-isto.

En la unua tago ni vizitis templojn en Hohhot: grandaj statuoj de kvar ĉielreĝoj minacis pordege, interne ne malpli timigaj bodisatvoj en diversaj koloroj ŝetis kolerajn rigardojn al teraj vizitantoj. Kelkaj mildaj budhoj ridetantaj, unu pli serene ol alia, tamen ree trankviligis nin.

La unua de oktobro, kiel konate nacia festotago, estis dediĉita al vizito al la plej granda ĉevalkurejo en Azio. Jen, mi tuj pensis, ebleco por mi vidi almenaŭ la ĉevalojn, se mi ne vidos ankaŭ iom da stepo kaj blua ĉielo... Sed estis ja nacia festo kaj ripoztago. La tuta ĉevalkurejo estis fermita. Nur blua ĉielo abundis...

Poste ni veturis al la tombo de Wang Zhaojun (Ŭang Ĝaŭĝjun), en la alia parto de la Hohhota regiono. Wang Zhaojun estis fama belulino de Han-dinastio, edzinigita al la reĝo de la hunoj. Ĉe la tombo, ni grimpis al la pinto de monteto. Pro la ebena tereno videblis eĉ foraj lokoj. Trans kampojn, kanaletojn, arbojn kaj argilajn domegojn ĝis la forega montaro, kiu ĉiam bluas kaj grizas pro nebulo kaj distanco. Trans aŭtunon flugis niaj rigardoj, moviĝoj okazis ĉie: jen kamparanoj okupiĝis pri rikoltaĵoj, jen azeno vagis maĉante herbon, jen vagono kun brasikoj veturis al la urbo. Aŭtuno — la flava koloro jam ekabundis sur la arboj, kongruante kun la flava tero.

La duan de oktobro. Stepo. Frua vekiĝo kaj ek al la maŭzoleo de Ĝingis-Ĥano. La vojo serpente tra la Ordos-stepo: vasta ĉielo, larĝa pejzaĝo, montoj iom ruĝas kaj flavas kaj aspektas ĉizitaj el sablo. Iom poste, dezerteca pejzaĝo etendiĝis tiom foren kiom atingis niaj okuloj.

Ie ni elaŭtiĝis por senti la sablon, kiu flave brilis en la suno. Blua ĉielo supre, sablo, sablo kaj sablo sub la piedoj, kaj baldaŭ ankaŭ sablo en la ŝuoj, en la ŝtrumpoj, inter la piedfingroj.

Ni atingis la maŭzoleon de Ĝingis-Ĥano post kelkaj pliaj horoj. En tagmezo mongolaj knabinoj kantis kaj ofertis trinkaĵon — kutime brando, sed ĉifoje, ĉar neniu el ni kutimas je tiom forta alkoholaĵo, ni rajtis trinki teon, eltrinkante la tason: "Ĝis la fundo!"

Ekster la maŭzoleo ni trifoje ĉirkaŭiris obon (obo: ŝtona kolektaĵo alta, sur kiun oni devas aldoni ŝtonon kaj ĉirkaŭiri.) post aldono de ŝtonoj al ĝi. Revene ni haltis ĉe la Flava Rivero, kie ĝi jam tre larĝis. Malrapide ĝi fluis surface, oni klarigis al mi, ke sub la surfaco ĝi danĝeras, tie akvo rapidas.

Lastan tagon en Interna Mongolio ni vizitis la faman templon Wudangzhao (Udangĝaŭ). Tra montara pejzaĝo ni veturis, preter parto de la Granda Muro antikva. Tie, en valetoj, videblis jam la templo, blanke brilanta kontraŭ la verda monto. Ni ekgrimpis kaj vizitis plurajn halojn kun diversaj budhoj kaj bodisatvoj kaj kelkajn kun protektantoj de budhismo. Ĉe iu pordo ni haltis: maljuna monaĥo tie volis paroli pri vivo, ĉielo kaj infero, mi komprenis plejparton, sed devis tre peni por kompreni la tre apartan prononcon lokan.

Tiel pli-malpli finiĝis mia vizito ĉifoja al Interna Mongolio, sub blua ĉielo, sur monto.

VIZITO AL GANSU

En oktobro-novembro 1993 mi pasigis ses se-



La aŭtorino (meze) kaj ĉinaj esperantistoj

majnojn en la nordokcidenta parto de Ĉinio en la Gansu-koridoro. La restado iĝis tre aventura kaj ĉefe, tre speciala por mi. En Lanzhou, granda kaj industria ĉefurbo de la provinco, mi vagis tra la stratoj, rigardante la vivon kaj spertante — ne por la unua fojo — tre multe da strangaj reagoj ĉe homoj: ĉe ĉiu paŝo aŭdeblis minimume unu “Hello” kaj homoj eĉ turniĝis por pli bone rigardi nin, dum mi preterpasis. Mi do konkludis rapide, ke en Lanzhou evidente ne multaj eksterlandanoj vizitas. Iom post iom mi komprenis, ke en tuta Gansu, krom Dunhuang, tre malmultaj alilandanoj vizitas!

Jam la vetero ekmalvarmis en la montaro, kiam mi veturis norden per buso, eĉ neĝo videblis sur la montpintoj. Temis ja pri Qilian(Ĉjiljan)-montaro, longa kaj neĝoĉapa montoĉeno, kiu akompanis min ĝis Dunhuang, foje pli fora, foje proksima, sed ĉiam blua kaj blanka en la fono, ronde de la kampoj aŭ dezerto.

La urbo Zhangye, meze de Gansu, vere impresis min. La unuan tagon mi sola travagis piede la vidindejojn: ligna pagodo, nun fermita sed impresa de ekstere; templo Xilai, kie mi amikiĝis kun 3-4-jaraj infanoj, kiuj instruis al mi, kiel meti incenson kaj kliniĝi antaŭ budhoj kaj bodisatvoj. Fine post mallonga vizito al la argila pagodo, mi atingis la templon de la Granda Budho. Enirinte la halon de la Budho, mi unue vidis nur la faldojn de lia robo. Iom post iom mi al kutimiĝis al la mallumo kaj ekmiregis: giganta kuŝanta budho etendiĝis antaŭ miaj okuloj. Mil jarojn li kuŝis tie en nirvano, kun brilantaj duone fermitaj okuloj tre vivaj, kun robo zorge faldita kaj piedoj precize metitaj unu sur la alia. Ĉirkaŭ li staris liaj disĉiploj, unu pli trista ol alia, kaj ĉe la muroj sidis arhatoj en profunda meditaco. Mi silente observis la scenon kaj en la mallumo kvazaŭ kaŝe iris ĉirkaŭ la giganta budho, por fine reveni al la

luma pordego. Silento regis.

El Zhangye mi elveturis al la Mati-kara templo, kie mi vidis la hufan spuron de la ĉevalo de Gesal, trezorojn kun budhoj kaj belegan pejzaĝon.

Mi pluveturis al Jiayuguan (Ĝjayugŭan) tra Jiuquan (Ĝiŭĉjŭan) por vidi la Ming-dinastian fortikaĵon. Kun e-isto mi bicikle vizitis la fortikaĵon meze de Gobi-dezerto. Nigris montaro en la oriento, Qilian-montaro blankis en la okcidento. Meze altaj muroj el sunbakitaj brikoj atente gardas la pasejon. Inter la muroj sonis ĉo, kaj mia akompananto batis per ŝtoneto grandan ŝtonon. Tiel oni kutimis mesaĝi antaŭe.

Dezerto impresis min forte. Sablo kaj kreskaĵoj, tiom multe kiom oni povas elteni per unu rigardo. Neinterese, klarigis al mi la lokanoj. Por mi tamen estis tre interese. Mi neniam satiĝis pri dezerto, mi povis dum horoj nur observi la sablon, la bluan ĉielon, la montojn en la fono.

Pri Dunhuang mi jam multege aŭdis antaŭe. Pri kavernoj de Mogao, sabla oazo kaj tiel plu diris la turismaj informiloj. Mi vidis la kavernojn — dekon da — kaj per lampeto esploris la pentraĵojn. Jam travivaĵo en si mem en la mallumo malkovri bildon post bildo.

Revenvoje al la urbocentro ekventis kaj la ĉielo rapide griziĝis. Sablo ĉirkaŭis min, flugis en miajn okulojn. Ne malmultiĝis la vento. Tamen amiko pruntis motorciklon kaj ni veturis al la monto de sonora sablo. Tie ni rajdis kamelon, kiu preskaŭ rifuzis iri en la vento. Ni atingis la monton, ekgrimpis kaj preskaŭ forbloviĝis ĉe ĉiu paŝo. Suben ni ruliĝis, kuris, saltis...

Post tri semajnoj en la Gansu-koridoro, mi reatingis la provincan ĉefurbon kaj ankoraŭ post du semajnoj la landan ĉefurbon. Mi riĉiĝis multe je sperto. ■


Juna tibeta dancistino

Teksto kaj fotoj de DA WEI

Antaŭ nelonge okazis en Pekino amuzvespero, en kiu 28-jara dancistino Zhuoma (Ĝuoma) donis profundan impreson al la spektantoj per sia dancarto.


La danco "Yarlung Zangbo", prezentita de ŝi, montras la amon al la hejmloko kaj adoron al la rivero. La danco "Qomolangma" spegulas la reflekseblan karakteron de la fama montpinto de la mondo. La soldanco "Patrino", kiun ŝi kreis surbaze de tibeta popola danco, vidigas la internan mondon kaj senlacas strebadon de bonkora patrino. La dancoj de Zhuoma, plenaj de vivetoso, kunfandiĝas kun la tradicia tibeta kulturo.

Zhuoma diplomiĝis el la dancarta fakultato de la Centra Nacimalplimulta Instituto de Ĉinio. En 1990 ŝi gajnis la unuan premion de la Konkurso pri Soldanco, Duopa Danco kaj Triopa Danco de Nacimalplimultoj de Ĉinio. Ŝi prezentis en Francio, Britio, Germanio, Belgio, Japanio kaj multaj aliaj landoj kaj regionoj.




Soldanco





Soldanco



Duopa danco (Zhuoma maldekstre)

Gaja tibeta danco (la plej antaŭa dancistino es tas Zhuoma)



PROBLEMOJ EN LA MONDA MEDIPRO- TEKTO

SUPERNORMA ATMOSFERA POLUCIO La kvanto de karbona dioksido ellasita en la lasta jarcento pliiĝis je 20%. Ĉ. duono de la urbanoj de la mondo vivas en atmosfero kun supernorma karbona dioksido.

VARMODOMA EFEKTO GRANDIĜANTA De 1950 ĝis 1985 la kvanto de karbona dioksido, nitrogena dioksido kaj klor-fluor-karbono, ellasita sur la tuta terglobo, pliiĝis 20-oble. Meteorologo antaŭkalkulis, ke en 2025 la meza temperaturo de la supra tavolo de la terglobo plialtiĝos je 1°C kaj je 1.5°C-4.5°C en la mezo de la venonta jarcento.

OZONOSFERO ROMPITA Sciencistoj trovis, ke ĉiun printempon la ozonokvanto en la atmosfero super Antarkto reduktiĝas je 40-50%.

DEZERTIGO DE KAMPOJ Troa uzado de kemisterko kaj insekticido kaj kreskanta kvanto de industria forĵetaĵo serioze degenerigas la kampojn. Triono de la kontinenta supraĵo de la terglobo estas minacata de la dezertigo. Ĉiujare 5-7 milionoj da hektaroj da kampoj dezertiĝas.

SERIOZA POLUADO DE AKVOFONTO Sur la terglobo ĉiujare almenaŭ 1 533 kubaj kilometroj da akvo estas poluitaj de sterko kaj venenaj kemiaĵoj. En la mondo la poluita akvo kaŭzas morton al 25 000 homoj ĉiujare.

KRIZO DE MARA EKOLOGIO Ĉiujare en la mondo oni forĵetas 20 miliardojn da tunoj da rubo en maron. Pro poluado de maro pli multaj ĉemaraj loĝantoj suferas de hepatito, ĥolero kaj aliaj malsanoj, kaj fiŝoj, salikokoj kaj aliaj markreskaĵoj mal-multiĝas aŭ mortas.

VERDAJ ŜIRMILOJ EN DRASTA MALMULTIĜO Ĉiujare en la lastaj 20 jaroj 20 milionoj da hektaroj da arboj en la mondo estis forhakitaj. Arbarizado estas malpli rapida ol blinda hakado de arboj.

SPECIOJ DE ESTAĴOJ RAPIDE MALMULTIĜAS En 1860 la totala nombro de homoj kaj dombestoj konsistigis 5% de tiu de la kontinentaj animaloj. En 2000 ĝi konsistigos ĉ. 40%. Laŭ antaŭkalkulo, en la 21-a jc la totala nombro de specioj de estaĵoj, kiuj eble pereos, estos du milionoj, tio ege minacas la homaron.

RUBO MINACAS LA HOMARON Sur la terglobo rubo pli kaj pli multiĝas. Antaŭ du jaroj sur la terglobo ĉiujare pliiĝis je 10 miliardoj da tunoj da rubo, po du tunoj por ĉiu homo.

KIOM DA ĈINAJ IDEOGRAMOJ?

La Granda Vortaro Kangxi, kompilita en 1716,

kun 42 volumoj kaj 43 400 ĉinaj ideogramoj, estas la plej antikva kaj perfekta vortaro de Ĉinio. Plejparto de la ideogramoj estas malnovtipaj. Sed kun paso de tempo, de longe ili jam ne uziĝis, krom tiuj en historiaj dokumentoj kaj klasikaj literaturaĵoj. Ĉ. 3 000 el ĝiaj ideogramoj estas uzataj en la nuna tempo.

La Japana Ŝtata Instituto de la Ĉina Lingvo faris enketon pri la uzado de ĉinaj ideogramoj en 90 gazetoj kaj ĵurnaloj de Ĉinio kaj anoncis, ke la nombro de malsamaj ĉinaj ideogramoj uzataj estas 3 328 kaj la nombro de la ripetfoje uzataj — 280 094.

La ripetigo de la 3 328 ideogramoj uzataj en la supre menciitaj gazetoj kaj ĵurnaloj dividiĝas en kvar gradojn:

A. 653 ideogramoj ripetigis pli ol 101 fojojn. B. 635 ideogramoj — 31-100 fojojn. C. 707 ideogramoj — 9-30 fojojn. Ĉ. 1 510 ideogramoj — malpli ol ok fojojn.

La kvar gradoj indikas, ke estas 3 328 ofte uzataj ideogramoj. Poste, la instituto faris enketon al aliaj gazetoj kaj ĵurnaloj kaj trovis, ke 177 ideogramoj havas ankoraŭ pli malgrandan ripetigon de uzado. Kun la menciitaj 3 328 ideogramoj, estas sume 3 505 ofte uzataj ideogramoj.

La mezgrandaj vortaroj, kompilitaj en la lastaj jaroj, entenas 60 000 artikolojn el ideogramoj, vortgrupoj, idiotismoj kaj proverboj, tamen ankaŭ ili entenas 3 000 ofte uzatajn ideogramojn.

YONGFENG, LA KORO DE LA KONTINENTO DE AZIO

La kontinento de Azio ekzistas jam de centoj da milionoj da jaroj. Sed neniu sciis antaŭe, kie estas la koro de Azio.

Post unujara esplorado laborantoj de la Xinjiang (Ŝingĵang)-a Geografia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj konstatis, ke geografie la koro de la kontinento de Azio lokiĝas en la vilaĝo Baojiacaozi (43°40'37"N, 37°19'52"E) de la subdistrikto Yongfeng en la gubernio Urumqi, Xinjiang. La vilaĝo distancas je 30 km de la urbo Urumqi, la ĉefurbo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

En- kaj eksterlandaj fakuloj opinias, ke la eltrovo kun preciza kalkulo kaj solida argumento estas rigardata kiel grava scienc-esplora frukto de Ĉinio.

Ĉe la koro tutjare fluas fonto kun akvo klara, dolĉa kaj ĉiam varmeta. Post ekzameno oni trovis, ke la fontakvo nepoluita entenas natrion, stroncion, karbonaton kaj multspecajn mineralojn kaj mikroelementojn. Ĝi estas tre valora por trinkado kaj oficinala uzado.

Per sia mistero la loko allogas sennombrajn geografojn, biologojn, esploristojn kaj turistojn el aliaj lokoj de la mondo.

La Longa Koridoro en la Somera Palaco

Teksto de LI QIANG

Fotoj de REN SHIYIN

EN la nordokcidenta parto de Pekino troviĝas Yiheyuan (Jiheyuan ĉinlingve signifanta ĝardenon de harmonio), konata kiel la Somera Palaco, la plej granda kaj plej bela el la imperiestraj ĝardenoj de Ĉinio. La ĝardeno, kiu enkorpigas la tradician ĝardenistikon de norda kaj suda Ĉinio, aspektas majesta kaj eleganta. Tie estas verda monteto, belaj lago, belvidaj pavilonoj kaj zigzagaj verandoj. Ĉe la piedo de la monteto Longviveco kaj apud la ondetanta Kunming-lago estas la fama tegmentita promenejo — Longa Koridoro.

La Longa Koridoro zigzage etendiĝas 728 metrojn. Ĝi estas ornamita per kvar okangulaj pavilonoj kun duobla tegmentrando. Plej okulfrapas pentraĵoj sur la traboj kaj kolonoj de la koridoro. Ĉiuj pentraĵoj prezentas belajn pejzaĝojn, florojn, fiŝojn kaj birdojn, kaj ankaŭ multajn versimilajn homfigurojn el popolaj rakontoj.

Neniu scias la precizan nombron de la pentraĵoj. Iuj diris, ke la totala nombro superas 8 000. Vizitantoj

ofte haltas por ĝui pentraĵojn de homfiguroj. Ne nur naivaj infanoj kaj scivolemaj gejunuloj, sed ankaŭ mezaĝuloj kaj maljunuloj, kiuj travivis multon, deziras scii, kiuj estas la herooj de la pentraĵoj kaj pri kio ili rakontas, por ne paroli pri tiuj, kiuj venis de aliaj landoj.

Tamen, nur malmultaj scias, pri kio rakontas la pentraĵoj, ĉar la rakontoj cirkulis de tre longa tempo de antaŭ 5 000 jaroj ĝis Qingdinastio (1644-1911), la lasta dinastio de la feŭda socio de Ĉinio. La pentraĵoj temas pri historia rakonto, legendo, klasika romano, teatro, mito, fabelo, poemo kaj anekdoto. Iuj pentraĵoj spegulas la tradician virton de diligenteco kaj modesteco, aliaj prezentas historiajn ŝanĝigon kaj evoluon, triaj prikantas la rezistadon de la ĉina popolo kontraŭ agresado kaj subpremado, kaj kvaraj laŭdas la amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj. Apreci la pentraĵojn signifas legi historian libron. La pentraĵoj de la Longa Koridoro estas fenestro por koni la historion kaj kulturon de la ĉina nacio.

El la figuraj pentraĵoj la plej multaj temas pri rakontoj el famaj

ĉinaj klasikaj literaturaĵoj, ekz., “Pilgrimado al la Okcidento”, “La Tri Regnoj”, “Songo en Ruĝa Buduaro” kaj “Ĉe la Akvorando”. Simio Sun Wukong (Sun Ukong), heroo de la mita romano “Pilgrimado al la Okcidento”, estas vaste konata en Ĉinio. Eĉ 3-4-jaraj infanoj komprenas pli-malpli pentraĵojn pri Sun Wukong.

La kvar pavilonoj bele ornamas la Longan Koridoron kaj pro sia grandeco la pavilonoj havas sur si spektaklajn pentraĵojn kun multaj homfiguroj. Ekz., iu granda pentraĵo vidigas, kiel Simio Sun Wukong batalas kontraŭ ĉielaj soldatoj kaj generaloj kaj ribelas kontraŭ la Ĉiela Palaco. La delikate pentritaj homfiguroj montris altan pentrarton.

Pentraĵoj sur mallarĝaj traboj de la Longa Koridoro estas multe pli malgrandaj kun simpla sceno kaj ĉefaj herooj. Vidante tiujn pentraĵojn, kiuj ne rilatas unu kun alia, oni sentas sin kvazaŭ en labirinto. Se ne konsulti fakulojn, oni eble ne komprenas la enhavon de la pentraĵo. Jen kuŝas en tio la allogo de la Longa Koridoro. ■

(Daŭrigo de p. 8)

de lua entreprenado, entreprenado laŭ kontrakto, vendado k.a. Krome, ili povas praktiki ankaŭ akcian sistemon.


— La ŝtataj entreprenoj nereformeblaj, kiuj ne funkcias bone de longe kaj kies produktaĵoj ne trovas merkaton, devas bankroti

leĝe.


— Ĉiuj novaj projektoj devas esti entreprenataj laŭ kompania sistemo de leĝa persono. Oni devas starigi kompanion antaŭ ol komenci entreprenadon de nova projekto.

Starigi la modernan kompanio-entreprenan sistemon

ne signifas simple transformi la ekzistantajn entreprenojn en kompaniojn. Tio celas ĝisfunde transformi la organismon de entreprenado, disigi la registaran administradon disde la entreprenado, tiel ke la entreprenado ne plu estos dependanto de la registaro, sed fariĝos ento de leĝa persono, kiu respondecos pri la profito kaj perdo de la entreprenado. ■




La Longa Koridoro



Parto de la Longa Koridoro

Pentraĵo pri popola rakonto






Pentraĵo el la ĉina klasika romano "La Tri Regnoj"



Sur la traboj de okangula pavilono



(Datrigo de p. 5)

INDUSTRIO EN VIGLA DISVOLVIĜO

La regiono estas sur tipa ebenaĵo de Ĉinio. Tie ne estas monto, nek mino. Tero estas ĉefa riĉfonto por ekonomia disvolviĝo. Sed pro grandnombraj loĝantoj, malmulte da tero, kaj senĉesa kurzleviĝo de la produktaj rimedoj, la agrikultura produktokosto multe pliiĝas, en nemalmultaj lokoj aperis la situacio kun granda agrikulturo, malgranda industrio kaj malriĉa financo.

Hodiaŭ oni praktikas la politikon de merkata ekonomio. Kiamaniere la tiea popolo strebas al la celo de bonhaviĝo post kiam ili solvis la problemon de manĝaĵoj kaj vestoj? Mi vidis brilan perspektivon en la Henan-a Limigita Kompanio de Ŝuoj Xianghong investita kune de Ĉinio kaj alia lando. Ĝi estas vilaĝa entrepreno en Luyi-gubernio.

Komence la kompanio havis nur kelkajn kabanonjn kaj martelojn. Importinte el Italio avangardan ŝuo-produktan aŭtomacian linion, ĝi fariĝis fama entrepreno produktanta ĉiujare 1.2 milionojn da paroj da ŝuoj, kun jara produktovaloru de 150 milionoj da juanoj. Dank' al ĝi, Xuanwu, kie troviĝas la kompanio, fariĝis bovobreda bazo de Ĉinio. En la malgranda urbeto funkcias pli ol 50 entreprenoj de bovaĵ-prilaborado, bovleda tanado kaj suoproduktado. Tiel la tieaj kamparanoj iris sur la vojon de riĉiĝo.

Kiam mi vizitis la Zhoukou-an Tekstilan kaj Prestinkturaran Fabrikon, la fabrikestro informis al mi, ke la fabriko estas la plej granda tekstila kaj prestinktura entrepreno de la provinco, kun 80 000 spindeloj kaj 2 100 teksmaŝinoj. Ĉiujare ĝi prestinkturas ŝtufon de 80 milionoj da metroj kaj ĝiaj produktaĵoj vendiĝas ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en aliaj landoj. En la loko abunda je kotono, felo kaj silkraŭpaj kokonoj ne mankas materialoj de tekstila industrio. Ĉi tie preskaŭ en ĉiuj gubernioj aŭdiĝas teksmaŝina bruoj.

Nun en la regiono funkcias nombro da industriaj entreprenoj, el kiuj la plej elstaraj estas la Minquan-a Vinofabriko de Minquan-gubernio, Linhe-a Vinfarejo de Shangqiu-subprovinco, Henan-a Fridujo-fabriko, Zhoukou-a Fabriko de Mononatria Glutamato kaj Zhoukou-a Fabriko de Telekomunikaj Kabloj. La Zhoukou-a Fabriko de Mononatria Glutamato, pri kiu raportis EPC en sia 3-a numero de 1993, produktis ĉiujare 400 tunojn da mononatria glutamato antaŭ 10 jaroj, sed nun kiel la plej granda fabriko tiurilate de Ĉinio, ĝi produktas jare 60 000 tunojn kun marko Lotuso. La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke Xiangcheng-gubernio, kie sidas la fabriko, havas abundan subteran akvon kaj produktas maizon, materialon por mononatria glutamato. ■

Por doni puran akvon al pekinanoj

Teksto de HU YUN

Fotoj de DA WEI

EN Ĉinio cirkulas la diro: "Trinkante akvon, oni ne devas forgesi la putistojn." Por pekinanoj la diro devas esti: "Trinkante akvon, oni ne devas forgesi Miyun-anojn" ĉar, se pekinano trinkas dek glasojn da akvo tage, do ses el ili venas el Miyun-gubernio.

Kiel gubernio sub Pekino, Miyun situas nordoriente de ĝi. Antaŭ longe mi informiĝis, ke en la gubernio kuŝas akvokonservejo taŭga por remado kaj naĝado, kaj tial ĝi allogis al si multajn turistojn. Sed mi sciis malmulte pri ĝia akvoprovizado al pekinanoj. Nur post kiam mi vizitis la lokon en mezaŭtuno, mi ja sciigis pri ĝia graveco por Pekino.

Miyun-akvokonservejo, konstruita en 1958, povas enteni maksimume 4.3 miliardojn da kubmetroj da akvo. Mi pensis, ke en la ora aŭtuno tie certe kolektiĝas sennombraj turistoj. Sed fakte sur la 20-kilometra ŝoseo ĉirkaŭ la akvokonservejo kaj sur ĝia granda digo, mi ne vidis eĉ unu homon. Ĉu la regiono jam fariĝis senhoma? Ĉe tio s-ro Peng el la gubernia registaro klarigis al mi: "La akvokonservejo ĉiujare donas 80% de la akvo uzata de Pekino, precipe post 1985, kiam la Pekina Magistrato decidis, ke ĝi estu la ĉefa fonto de akvo por la vivo de pekinanoj, ĝi ne plu estas turisma loko. En ĝi estas malpermesate ŝipveturi kaj naĝi. Tial regas kvieteco tie." Sed mi pensis en mi, ke la kvieteco signifas grandan perdon en la

ekonomio de la gubernio.

Efektive, por doni puran akvon al Pekino Miyun-gubernio suferas eĉ pli grandan perdon. La montregiono konsistigas 83% de la totala areo de la gubernio, tial la kulturebla tero estas ekstreme kara por Miyun-anoj. Sed kiam la ĉina registaro decidis konstrui akvokonservejon tie, ili oferis multajn kampojn por tio. Nun la Pekina Magistrato decidis, ke la gubernio donu akvon ne nur al produktado, sed ankaŭ al la vivo de la urbanoj. Por ke la pekinanoj trinku puran akvon, Miyun-anoj ne nur ĉesigis ĉiun ajn turisman aktivadon en la regiono, sed ankaŭ reguligis industriajn projektojn ekspluatatajn ĉirkaŭ la regiono. Rezulte de tio, pli ol 20 poluciantaj projektoj, kiaj minekspluatado kaj paperfarado, estas nuligitaj.

S-ro Ma, estro de la gubernia mediprotekta kaj monitora stacio, diris, ke ekde 1985 la stacio faras regulan monitoradon de trinkakvo laŭ la duagrada normo difinita de la ŝtato, cetere, ĝi respondecas ankaŭ pri taksado de la influo de konstruataj projektoj al la medio. En la lastaj jaroj pli ol 40 projektoj estis ĉesigitaj de la stacio post taksado. En 1987 oni planis ekspluati fer-minejon malproksime de la akvokonservejo. La stacio taksis, ke ĝi ne polucios la akvokonservejon. Malgraŭ tio, por absolute garantii la purecon de la akvo, la stacio faris detalan proponon evitigi la poluciadon de la akvokonservejo.

Forlasinte la stacion, nia aŭto malrapide kuris sur la ŝoseo ĉirkaŭ la akvokonservejo. En la malproksima montaro kreskis pinoj, kaj sur la proksimaj montdeklivoj ruĝis folioj de arbedoj, atakite de la friska aŭtuno. Mi ne volis demandi, nek pensi. Mia animo ŝajne kunfandiĝis kun la kvieteco.

Subite, la kvietecon rompis birda kantado. Mi vidis, ke multaj nestoj kaŝiĝas inter arbobranĉoj. S-ro Peng ĝoje diris al mi, ke tie estas sume 1 800 nestoj, kaj plejparto de ili estas de pigoj.

Ju pli da arboj, des pli da birdoj. Nun, 52% de la regiono ĉirkaŭ la akvokonservejo estas kovrataj de verdaĵoj. Sed antaŭ 30 jaroj la montaro ĉirkaŭe estis kalva. Tuj post la finkonstruiĝo de la akvokonservejo 200 000 konstruantoj komencis arbarizi la montaron. Ili difinis 13 verdigotajn terenojn ĉirkaŭ la akvokonservejo kaj arbarizis 5 400 hektarojn sur deklivaj kampoj. Nun dense kreskas forstaro ĉirkaŭ la akvokonservejo, kun areo de 37 300 hektaroj, 24 000 hektaroj da arboj sur montoj estas protektataj, kaj la verdigita areo de la regiono atingis 80 000 hektarojn. En la lastaj 15 jaroj, dank' al arbarizo la akvo en la akvokonservejo fariĝis klara, kaj la kvanto de sablo en ĝi

malgrandiĝis je 60%.

Sed novan problemon renkontis Miyun-anoj, t.e., kiam fiinsektoj atakas arbojn ĉirkaŭ la akvokonservejo, oni ne rajtas uzi insekticidon al ili por garantii purecon de la akvo. Kiel do mortigi fiinsektojn kaj samtempe teni la purecon de la akvo? En 1982 fakuloj de la gubernio komencis bredi kaj dresi griz-pigojn, naturajn malamikojn de fiinsektoj, en pinaro de 870 hektaroj. La eksperimento sukcesis post 10 jaroj. Tiuj griz-pigoj havas sian propran neston. Laŭ la fajfado de la dresistoj ili flugas en la arbaron matene kaj reflugas vespere. Unu griz-pigo manĝas tage ĉ. 400 fiinsektojn. Pasintece, uzado de insekticido konsumis multe da tempo kaj la insekticido poluciis la medion. Krom fiinsektoj, ĝi mortigis ankaŭ iliajn naturajn malamikojn. Tamen la nova rimedo por mortigi fiinsektojn donas bonan efikon kaj ŝparigas monon.

Samtempe kun tio, la gubernio disvastigas la teknikon mortigi la dua-generaciajn piralidojn per trihogramoj (*Trichogramma evanescens*) sur ĉiuj kampoj de maizo. Nun relative perfekta estas la tekniko fabrike bredi trihogramojn kaj ellasi ilin por mortigi piralidojn. Cetere, ĝi starigis mikroban eksperimentan stacion, kiu produktas 500 tunojn da senpolucia bioinsekticido ĉiujare.

Miyun ne nur garantias la purecon de surtera akvo-fonto, sed ankaŭ malebligas poluciadon de subtera akvofonto. En la guberni-urbo estas dika sablo-tavolo tralasiva. La malpura akvo el produktado kaj ĉiutaga vivo enpenetris sub la teron, malpli ol du kilometrojn fluante, kaj tralasiĝis malsupren kun rapideco de 1-1.5 kilometroj ĉiujare. Sed la putaro de iu pekina akvo-fabriko troviĝas 15-25 km fore de la guberni-urbo. Se ĝi estus poluciita, la rezulto do estus timiga. Pro tio, la gubernio konstruis fabrikon por trakti malpuran akvon. Veninte tien, mi vidis grandajn akvujojn ŝaŭmantaj kaj malbone odorantaj. Fabrikestro Gao Huiying (Gaŭ Hujjing) ĝoje diris al mi: "Kvankam la akvo en ili estas malpura, tamen ĝi fariĝos pura post traktado." Laŭ plano la fabriko ĉiutage traktos 45 000 tunojn da malpura akvo. La unuaperioda konstruo de la fabriko povas trakti 15 000 tunojn ĉiutage. Nun la fabriko preparas sin por la duaperioda konstruo.

Ĉe sunsubiro ni revenis al la digo. La akvokonservejo ore briletis. Apud ĝi longa kanalo kiel arĝenta rubando, etendiĝas foren tra kampoj. Mi pensis, ke eble ĝuste tra la kanalo akvo elfluas el ĝi al la kvartaloj de la ĉefurbo. ■




Miyun-akvokonservejo

La kanalo Jingmi, kiu kondukas akvon al Pekino





Traktejo de malpura akvo



Kemia analizado de akvo-specimeno

Laborantoj prenantaj akvo-specimenon

Originalaj historiaj libroj

de HOU JUELIANG

LA historio de Ĉinio, kiun oni notis per skriblingvo, havas ĉ. 5 000 jarojn, kaj en tiu periodo aperis multaj historiaj libroj. Deko da jaroj eble ne sufiĉos por legi ĉiujn tiujn librojn.

Mi ŝatas legi ĉinajn antikvajn historiajn librojn, kiuj estas speguloj reflektantaj la antikvan socion de Ĉinio. En tiuj speguloj mi konas prosperiĝon kaj kadukiĝon de la dinastioj, la evoluon de la socio kaj la progreson de sciencoj kaj tekniko. Mi admiras la eminentan regadon de la imperiestroj fondintaj la dinastion kaj la elstarajn militajn meritojn de la ge-

neraloj defendantaj la landon. Mi ankaŭ indignas pro la stulteco de sentaŭgaj imperiestroj, pro la kruelaĵoj de tiranaj regantoj, pro la orgioj de aristokratoj. Mi bedaŭras la mizeran vivon de la popolo. La enhavoriĉaj historiaj libroj malfermis fenestron por la homoj en studo pri la pasinteco de Ĉinio kaj liveris abundajn materialojn al la esplorantoj en ilia studo pri la diversaj flankoj de la antikva Ĉinio. Ili estas valoraj kulturaj heredaĵoj.

Ĉiuj dinastioj de Ĉinio donis grandan atenton al kompilado de historiaj libroj kaj instalas oficialan institucion por kolektado kaj reordigado de diversaj mater-

ialoj. Krom ŝtata oficejo, ankaŭ civiluloj faris kompiladon de historiaj libroj laŭ sia vidpunkto. Oni nomis la librojn kompilitajn de ŝtataj oficejoj "ortodoksaj", kaj tiujn kompilitajn de civiluloj "heterodoksaj". Mia nuna artikolo traktas la "ortodoksajn".

La multnombraj historiaj libroj estis verkitaj en malsamaj stiloj. Por bone montri la komplikan historion, la historiistoj ege akcentis la manieron de la prezentado. Ĉerpante de antaŭuloj sperton en kompilado de historiaj libroj, ili kreis novajn metodojn de kompilado, kaj de tio rezultigis diversaj stiloj de historiaj libroj. Kaj kvar el ili estis multe



Sima Qian

uzataj.

Historiaj libroj de la unua stilo estas analoj. "Printempo kaj Aŭtuno" kompilita de Konfuceo antaŭ 2 500 jaroj estas analoj. Ĝi estas la plej malnova historia libro de Ĉinio. Antaŭ tio iuj verkis historiajn librojn, sed ili ne herediĝis. Konfuceo notis la historiajn eventojn laŭ jaroj, de 722 ĝis 481 a.K. Tiu libro notis gravajn okazaĵojn kaj naturajn katastrofojn en la 242 jaroj. En la tempo de Konfuceo ne estis papero, kaj oni skribis sur bambuaj lamenoj. Por unu libro oni bezonis grandan kvanton da lamenoj. Pro tio Konfuceo laŭeble simpligis la tekstojn. Por ĉiu afero li skribis maksimume 40 ideogramojn, kaj por iuj okazaĵoj li uzis nur kelke da ideogramoj. La tuta libro enhavas nur 15 000 ideogramojn. Poste oni inventis paperon, kio multe faciligis la skribadon. En la 11-a jarcento Sima Guang verkis la libron "Zi Zhi Tong Jian" (Ĝeneralaj Instruoj por Regado) en 15 jaroj. La verko, konsistanta el 294 volumoj, notis la historion de 403 a.K ĝis 959 p.K. Ĝi el abundegaj materialoj resumis la sperton kaj lecionojn de regado de la ŝtato, kaj estis alte taksata kaj multe legata de la regantoj de la feŭdismaj dinastioj. Kaj eĉ nun ĝi daŭre funkcias kiel bona referenco.

La analoj havas sian superecon. La posteuloj povas facile trovi la datojn de la grandaj okazaĵoj en la historio kaj facile koni la interrilatojn inter la historiaj okazaĵoj. Kompreneble analoj havas ankaŭ malfortajn punktojn, nome, la notado laŭ jaroj ne povis koncentre konigi la tutan proceson de la grandaj historiaj aferoj, ĉar iuj grandaj okazaĵoj daŭris kelke da jaroj aŭ eĉ pli longe.

400 jarojn post Konfuceo naskiĝis en Ĉinio granda historiisto Sima Qian. Lia patro estis kronikisto de la kortego kaj posedis multajn historiajn materialojn.

Sima Qian preferis la okupon de la patro kaj multe sin preparis por verkado de historia libro. Li multe legis kaj vojaĝis al multaj lokoj por noti la faktojn. Sed kiam li estis en intensa verkado, lin trafis malfeliĉo: Li aŭdace pledis por sia amiko en la kortego, kio malĝojigis la imperiestron. Li estis enkarcerigita kaj kastrita. La malhonorega puno preskaŭ puŝis lin al sinmortigo. Sed kiam li konsciis, ke la verkado de historia libro ne estis finita, li penis vivi plue kaj daŭrigis la verkadon. Sinforgese li skribis retenante la indignon kaj malhonorigon. Lia libro "Historia Kroniko" el 520 000 ideogramoj registris la historion en 3 000 jaroj antaŭ lia tempo. Sima Qian prenis historiajn personojn kiel la centron de sia libro. Li verkis biografiojn por famaj historiaj personoj. Li kreis vivecajn historiajn figurojn per historiaj faktoj kaj notis la historion pere de priskribo de homoj. Legante lian libron, oni vidas ne la aferojn, sed diversajn personojn: imperiestroj, korteganoj, poetoj, verkistoj, kavaliroj, sikarioj, gvidantoj de kamparanaj insurekcioj, buĉistoj, pordistoj ktp. Tiaj libroj ne estas analoj, sed "biografiaj historiaj libroj". Oni ne enuiĝas dum legado de liaj verkoj, ĉar ili estas ne ordinariaj historiaj verkoj, sed verkoj novecaj, vivecaj el lingvo eleganta. La legado ofte ekscitas legantojn.


La "biografia historia libro" havas originalan fizionomion kaj propran superecon: Tiu stilo estas taŭga por registri politikon, ekonomion, kulturon kaj la historiajn agojn de personoj de diversaj socitavoloj kaj diversaj klasoj. Tamen ĝi havas mankon: La registraĵoj estas ne ordigitaj, kaj unu sama afero legiĝas ofte en biografioj de pluraj personoj. Krome, tiu stilo ne estas taŭga por registri la tutan proceson de unu afero.

Cent jarojn post Sima Qian

aperis en Ĉinio alia elstara historiisto Ban Gu (32-92 p.K.). Estas tre interese, ke ankaŭ lia patro estis kronikisto de kortego. Li verkis la "Libro de Han-dinastio" en 20 jaroj. La libro notis la historion de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.). Antaŭ ol fini la verkadon, Ban Gu forpasis. Lia fratino Ban Zhao kompletigis la verkon.

La stilo de la "Libro de Han-dinastio" estas simila al tiu de la "Historia Kroniko". Ankaŭ la "Libro de Han-dinastio" entenas ĉefe biografiojn, sed la notitaj historiaj okazaĵoj estis datlimigitaj en la kategorio de la dinastio. Tiu stilo estis kreaĵo de Ban Gu kaj nomata "dinastia historia libro". Ĉiuj postaj dinastioj havis sian historian libron. Estas entute 24 biografiaj historiaj libroj inkluzive de la "Historia Kroniko" kaj "Libro de Han-dinastio". Ankaŭ la lasta feŭdisma dinastio Qing (1644-1911) havas sian dinastian historian libron, sed ne oficiale reviziitan.

Kiel supre dirite, la historiaj libroj de la tri stiloj havas komunan mankon, nome, ili ne povas koncentre speguli la tutan proceson de la gravaj historiaj aferoj. Por kovri tiun mankon, parto de la historiistoj elhakis novan vojon per kreo de nova stilo de "kompleta notado". Libroj de tiu stilo notis komplete la tutan proceson de la aferoj de ilia estiĝo ĝis la fino. Ekzemple la "Kompleta Noto de Historio de Ming-dinastio" notis la tutan proceson de ĉiuj gravaj aferoj de Ming-dinastio (1368-1644). Sed la manko de historiaj libroj de kronika stilo estas evidenta, nome la libroj ne povas klarigi la interrilatojn inter la historiaj aferoj en la sama periodo, ne havas priskribon de personoj, sekve ili ne estas tiel interesaj kaj infektivaj kiel biografiaj historiaj libroj. ■



CHEN MO:

Dong Jianhua — fama ĉin-medicina kuracisto

Dong Jianhua

EN la 27-a Monda Konferenco pri Sano de UN fortika ĉino suriris la podion. Li faris prelegon kun la temo “La rolo de la ĉina medicino por la homa sano kaj la media higieno”. La prelego interesis ĉeestantojn el diversaj landoj, precipe tiujn el la Tria Mondo.

La preleganto estis Dong Jianhua (Dong Ĝjanhŭa), multe respektata ĉin-medicina kuracisto.

POR ĈIN-MEDICINA INSTRUADO KAJ ESPLORADO

D-ro Dong naskiĝis en Qingpu-gubernio de Ŝanhajo. Influate de sia avo, fama kuracisto, li studis la ĉinan medicinon jam de sia infaneco. En 1935, kiam li aĝis 14 jarojn, li disĉipliĝis al iu fama ŝanhaja kuracisto kaj servis kiel asistanto de la doktoro por multaj jaroj. En la komenco de la 50-aj jaroj li studis en la Progresiga Kurso de la Ĉin-medicinaj Instruistoj de Nankino. Post diplomiĝo li instruis en la Ĉin-medicinaj Institutoj de Nankino kaj Pekino kaj funkciis kiel gvidanto en ĉin-medicina hospitalo, redakcio de la Farmakologia Revuo de Ĉina Medicino, departemento de la ĉina medicino kaj higiena departemento de registaro. Li sin okupis 50 jarojn pri kuracado, instruado kaj esplorado de internaj malsanoj de la ĉina medicino kaj faris gravan kontribuon al la medicina afero de Ĉinio.

D-ro Dong estas lerta en kuracado de internaj, virinaj, infanaj kaj komplikaj malsanoj. Inter liaj pacientoj estas ĉinaj kaj alilandaj gvidantoj. Li fervore traktas ĉiujn malsanulojn kaj zorgeme kuracas ilin. Pro tio li estas multe laŭdata de la pacientoj.

Pro okupateco d-ro Dong ne volas esti intervjuata, sed mi feliĉe ricevis lian permeson intervjui lin. Li loĝas en iu pensiono de Pekino. En lia hejmo estas multege da libroj kaj materialoj. Li, 76-jara, estas sprita en pensado. Ni multe interparolis. Lia edzino prezentis al mi koncernajn materialojn kaj liajn verkojn, kiaj “Notoj pri malsanoj de malvarmo”, “Pri malsanoj de varmo”, “Praktika psikologio de la ĉina medicino”, “Kazoj de akutaj internaj

malsanoj de la ĉina medicino”, “Kuracarto de Dong Jianhua” kaj “Pri internaj malsanoj de la ĉina medicino”. Ŝi diris: “En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio la ĵus fondita ĉin-medicina instituto ne havis studobjektojn. Ĝi havis nur verkojn postlasitajn de antikvaj ĉinaj medicinistoj kaj tial Jianhua devis mem kompili lernilojn kaj fari ĉion necesan por instruado kaj esplorado.”

Interparolante, d-ro Dong prezentis al mi tri volumojn de la verko “Elektitaj kazoj traktitaj de famaj ĉin-medicinaj kuracistoj en la nuntempo” kaj siajn pli ol 100 disertaĵojn, el kiuj multaj estas premiitaj de la ŝtato. Per sia kontribuo li riĉigis la trezoron de la ĉina medicino.

SPECIFA KURACO DE GRAVAJ MALSA- NOJ

D-ro Dong ofte ricevas leterojn de siaj pacientoj, kiuj petas lian helpon aŭ esprimas sian dankon pro lia kuracado.

Komence de 1993, li ricevis leteron el Liaoning-provinco. En la letero legiĝas: “Mi nomiĝas Li Zhi, kiun vi resanigis antaŭ 14 jaroj. Se vi ne kuracus min, mi jam antaŭ longe ne vivus en la mondo.”

En 1978 Li Zhi suferis de ekzantemo kaj enhospitaliĝis. Post ekzameno oni konfirmis, ke li suferas ankaŭ de perikardia likvaĵo, pulma inflamo, grasa hepato kaj lupusa eritemo. Post diagnozo kuracistoj konstatis, ke tio estas miksita konektiva malsano. Per okcidentaj medikamentoj oni ne sukcesis bridi la malsanon. La hospitalo invitis Dong por kune fari diagnozon. Li preskribis medikamentojn. Post kiam Li Zhi prenis la medikamentojn, li sentis sin bone. La febro kaj ekzantemo evidente malgraviĝis kaj tute malaperis post du monatoj. Li elhospitaliĝis post unu jaro kaj daŭre prenis la pilolojn preskribitajn de d-ro Dong. Dank’ al tio lin ne plu atakis recidivo.

Foje, junulo kun barela ventro venis en la klinikon de d-ro Dong. Li malsaniĝis antaŭ du jaroj kaj la kuracado kaj operacio ne donis al li kontentigan efikon. En malespero li venis al d-ro Dong por peti

lian helpon. Li diris: "Mi estas nur 28-jara kaj edziĝis antaŭ du jaroj. Mi petas, ke vi nepre resanigu min, por ke mi vivu plu." Dong akceptis lin kaj ĝustatempe preskribis recepton por li laŭ ŝanĝiĝo de la malsano. Dank' al la zorgema kuracado dum pli ol unu monato, iom post iom malpliigis la ascito de la paciento. Antaŭ la elhospitaliĝo normaligis lia sanstato.

D-ro Dong estas lerta ne nur en kuraco de komplikaj internaj malsanoj, sed ankaŭ en ginekologio kaj pediatrio. Oni sentas sin feliĉa esti kuracata de li.

Itage, venis al lia kliniko pli-ol-30-jara virino, kiu ruĝiĝis antaŭ ol paroli. Ŝi edziniĝis antaŭ ok jaroj, sed ne gravediĝis. Ŝia bopatrino estis tre mal-kontenta pri tio. Tial ŝi estis ege maltrankvila kaj venis al d-ro Dong por peti lian helpon. Dong paci-ence persvadis ŝin, ke ŝi estu trankvila kaj bone kuracata. Post kvar monatoj ŝi kun ĝojo informis al la kuracisto, ke ŝi jam gravediĝis, kaj poste ŝi naskis filon. Ŝia edzo kun granda ĝojo venis al Dong por esprimi sian dankon.

HEREDO KAJ KREO

Heredante la sciojn de la antaŭaj medicinistoj, Dong Jianhua faris kreadon en kuraco de kronikaj malsanoj de la digesta sistemo.

Koncerne kronikan gastriton kaj atrofian gastriton, d-ro Dong malaprobis arbitran kaj sendistin-gan tonikadon. Li proponas kuraci gastriton per glatigo de la visceraj kanaloj kaj *ginglŭo*-vojoj, akcelado de la cirkulado de vitala energio kaj sango kaj mildado de interna febro. Eĉ se tonikado estas nepre necesa, oni devas kombini tonikadon kun glatigo. Surbaze de siaj klinikaj spertoj, li prezentis novan kuracteorion kaj 10 kuracmetodojn por mildado de interna febro kaj glatigo de *ginglŭo*-vojoj, konforme al la fiziologiaj trajtoj de la lieno kaj stomako. La de li resumitaj spertoj de kuracado estas pli sciencaj kaj pli efikaj.

En la urbo Changzhou estis maljunulo, kiu suferis de stomaka doloro, senapetiteco, marasmo kaj senforteco. La gastrica endoskopio kaj patologia ekzamenado montris, ke li suferas de kronika surfaca gastrito kaj kronika atrofia gastrito. Laŭ liaj simptomoj kaj aspektoj de la lango kaj pulso d-ro Dong preskribis al li drogherbojn por reguligi la hepatan kaj stomakan funkcion kaj glatigi la cirkuladon de vitala energio kaj sango. La malsanulo prenis 10 dozojn da drogherboj kaj liaj simptomoj evidente mildiĝis. Post unu monato la simptomoj malaperis kaj lia apetito pliboniĝis. Li daŭre prenis la medikamentojn preskribitajn de d-ro Dong kaj recidivon neniam atakis lin.

Observante sian principon pri kuraco de la lieno kaj stomako kaj konsiderante la trajtojn de la mod-erna vivmedio, d-ro Dong kreis serion da kuracme-

todoj kaj receptojn el pluraj medikamentoj, inter kiuj la recepto "Wei Su Chong Ji" estas efika por 96.3% de la malsanuloj suferantaj de diversaj kronikaj gastritoj, kronikaj ulceroj k.a.

Kial d-ro Dong akiris tiel elstarajn sukcesojn en la medicina esplorado kaj klinika praktiko? Oni atribuis tion al liaj ĝustaj vidpunktoj kaj metodoj por trakti la rilatojn inter heredo kaj disvolvo. Li diris: "Por lerni de antikvaj medicinistoj, oni devas serioze lerni de ili, sed ne kateni sin per iliaj spertoj."

POR JUNAJ DAŬRIGANTOJ

D-ro Dong faris instruadon de la ĉina medicino en multaj jaroj kaj elkulturis milojn da medicinistoj. Nun la de li elkulturitaj 23 esploristoj kaj doktoroj laboras kiel gvidanto aŭ ĉefkuracisto de provinco, municipo kaj aŭtonoma regiono.

Li ne nur kulturas siajn studentojn, sed ankaŭ fervore helpas aliajn junulojn interesigantajn pri la ĉina medicino. Iu juna kriplulino letere demandis pri kuraco de tifo. Li respondis kaj donacis al ŝi koncernen libron. Li kuraĝigis junan ĉin-medicinan kuraciston en la kamparo, por ke li bone servu al kamparanoj, kaj donacis al li kompletan da ĉin-medicinajn verkojn.

Dum sia instruado d-ro Dong tre akcentis la praktikon de la studentoj kaj edukon pri profesia moralo. Li estas afabla, tamen tre rigora al la studentoj. Li plurfoje kritikis tiujn, kiuj ne bone traktis malsanulojn. Dank' al lia insistado, en la Pekina Ĉin-medicina Instituto, kie li laboris multajn jarojn, kombini la teorion kun la praktiko kaj fervore servi al la pacientoj jam fariĝis moro. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1994

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendkosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY			4200,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
TARIFO A:	Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.			
TARIFO B:	Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.			
TARIFO C:	Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Latvio, Litovio, Estonio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.			

LAN SHAN:

Epopeo "Gesal" kaj ĝia disvastigo



Portreto de reĝo Gesal

EPOPEO, unu el la belaj monumentaj literaturaj verkoj de la homaro, honorigas sian popolon. Ĉu Ĉinio havas sian propran epopeon? Iam estis dubo pri tio. La esplorado en la lastaj dekoj da jaroj konfirmis, ke ne nur Ĉinio posedas epopeojn, sed ankaŭ ĉiuj ĝiaj nacioj havas la sian. "Reĝo Gesal", naskiĝinta sur la Qinghai(Ĉinghaj)-Tibeta Altebenaĵo, ja estas granda epopeo.

La epopeo "Gesal" rakontas, kiel la heroo Gesal subigis demonojn kaj malvirtulojn, batalis kontraŭ agreso kaj protektis la popolajn interesojn. Ĝi, kiel kristaliĝo de saĝo de la tibeta popolo, cirkulas inter tibetanoj, mongoloj kaj aliaj nacioj en nordokcidenta Ĉinio. La mongoloj evoluigis ĝin en "Rakontoj pri Gesal", kiuj en la mongola stilo temas pri iliaj propraj aferoj. "Gesal" jam fariĝis heroo epopeo,

Tibeta artisto rakontas pri reĝo Gesal.



peo, kune kreita de la nacioj tibeta kaj mongola.

"Gesal" naskiĝis antaŭ mil jaroj. Ekde 1956 oni faris vastan kolektadon kaj ordigadon kaj trovis proksimume cent eldonojn de "Gesal" en miliono da versoj el dek milionoj da vortoj.

"Gesal" konsistas el tri partoj. La unua parto rakontas pri naskiĝo de la heroo. Gesal estis filo de Baifan, reĝo de la ĉielo. Li estis saĝa, bela kaj fortika. Bodisatvo Avalokitesvaro, rimarkinte, ke en la homa mondo regas ĥaoso, tiranas demonoj kaj malvirtuloj kaj la popolanoj vivas mizere, konsilis al la reĝo de la ĉielo, ke tiu sendu sian filon en la homan mondon por savi la mizerajn popolojn. Tiel la reĝido fetiĝis en iu repudiita virino. En la aĝo de 15 jaroj li edziĝis al bela knabino Zhumo. Poste, li gajnis venkon en ĉevalkonkurso kaj fariĝis reĝo de la regno Ling kaj eknomis sin reĝo Gesal.

La dua parto, centro de la epopeo, rakontas pri subigo de demonoj kaj malvirtuloj. Gvidante sian armeon, Gesal militiris norden kaj suden, subigis demonojn kaj malvirtulojn kaj faris multe da bonoj por la popolanoj. Ĝi figure priskribas dekojn da intertribaj kampanjoj en la antikva tibeta socio. Tie legiĝas kaj animskuaj bataloj kaj sentimentalaj amepizodoj; sentiĝis kaj heroeco de martiroj por la nacio kaj kora plorado pro perdo de karuloj. Ĝi historie faris vastan kaj poezian priskribon pri la socia vivo de la unuiginta regno de la antikvaj tibetaj triboj, inkl. la penson, aspiron, virton kaj morojn de ĝia popolo.

La tria parto rakontas, ke Gesal venis en inferon, detruis la palacon de la infera dio kaj savis siajn patrinon kaj edzinon, kaj ankaŭ la suferan-

tajn popolanojn. Fine maljuna Gesal heredigis sian tronon kaj revenis al la ĉiela regno.

La epopeo per priskribo de la brilaj meritoj de Gesal dum lia tuta vivo sukcese prezentis estimatan heroon. Plej atentigaj estas liaj sinforjesa, brava batalspirito, eksterordinaraj saĝeco kaj komanda talento. Foje li, komandante sian armeon, faris sturmojn kaj trarompojn en batalo, foje li sola gajnis venkon per surpriza atako. Li estis gardata de multaj dioj kaj kunportata talismano. Li kun supera luktarto kaj granda magia povo povis aliformiĝi, aŭguri kaj profeti. Li, modesta, posedis ĉiujn noblajn kvalitojn de heroo. Ankaŭ li estis ordinara homo, kiu havis siajn ĝojon, malĝojon kaj dolĉan amon, sekve la epopeo estas plena de densa humaneco.

En Tibeto "Gesal" ĝuas grandan popularecon. Ĉiuj bone konas ĝin. Ĝiaj manuskriptaj kaj lignogravuritaj libroj estas multe legataj, la artistoj ĝin prezentas ĉie, kie ili estas. La popolaj artistoj multe kontribuis al kreado, konservado kaj disvastigo de la heroo epopeo "Gesal". Estas interese, ke koncerne "Gesal" tiuj popolaj artistoj preskaŭ havas ĉiu sian propran legendon.

Popola artisto maljuna Zaba povis kanti kaj rakonti pli ol 30 volumojn de "Gesal". Antaŭ lia morto oni surbendigis liajn prezentojn, sume 21 volumojn el pli ol 4 milionoj da vortoj en pli ol 400 mil versoj. Tio ja ne estis facila precipe pro tio, ke Zaba estis analfabeto. Li estis filo de servutulo. Pro mizereco li migris ĉien kaj vivtenis sin per kantado de "Gesal". Pro sia estimo al la heroo reĝo Gesal kaj amo al la bela epopeo li prezentis kun ekstazo. Li ĉiam prezentadis tutanime, ŝajne direktate de dio, flue kaj glate kantis kaj rakontis, kvazaŭ ĉiuj herooj en la epopeo starus tuj antaŭ li kaj la demonoj kaj malvirtuloj ĉirkaŭe.

Legendo diras, ke Zaba iam sonĝis, ke bodisatvo tranĉis al li la ventron, elprenis el ĝi ĉiujn internaĵojn kaj enmetis en ĝin la verkon "Gesal". Li konfesis al la bodisatvo, ke li estas analfabeto. Tamen, tiu respondis, ke tio ne gravas, li bone rakontos ĝin tuj post vekigo. Vere, ĉiufoje, post kiam li sonĝis tian sonĝon, li povis pli multe rakonti pri Gesal aŭ fari la rakontitajn historiojn pli komplikaj kaj emociaj.

Nun estas artistino Yumei, kiu povas rakonti pli ol 70 volumojn de la epopeo. Ŝi, 36-jara tibetanino, ne povoscias la tibetan lingvon, eĉ ne scias skribi sian nomon. Ŝia vivvojo estas mistera.

Ankaŭ ŝia patro estas artisto pri "Gesal", tamen li neniam instruis al sia filino. Ŝi povas kanti kaj rakonti multajn historiojn, kiujn ŝia patro ne konas.

Oni diris, ke iutage 16-jara Yumei paŝtis ŝa-

faron sur monto. Ŝi ludis tie kaj endormiĝis. En sonĝo ŝi vidis, ke demono ĉirkaŭvolvis ŝian dekstran brakon per nigra tolaĵo kaj tiris ŝin al nigra lago. Ĉe tio eliris el blanka lago bela feino, kiu ĉirkaŭvolvis ŝian maldekstran brakon per silka rubando, dirante al la demono: "Ŝi estas benata. Mi instruas, ke ŝi disvastigu la heroojn de la reĝo Gesal al ĉiuj bonzoj kaj laikoj de Tibeto." Aŭdinte tion, la demono forkuris. La feino banis ŝin kaj ordonis ŝin hejmenreveni. Dia aglo portis ŝin sur monton. Ĝi diris, ke ĝi deprenos pecon da karno de ŝi por kulti la dion, kaj ŝi vekigis de la pikado.

La sekvantan tagon Yumei malsaniĝis. En duondormo aperis antaŭ ŝiaj okuloj batalaj scenoj, en kiuj viglis la reĝo Gesal. Resaniĝinte, ŝi ja povis rakonti "Gesal". Iuj historioj pri bataloj, rakontitaj de ŝi, troviĝas nur en manuskriptaj libroj kaj ilin la aliaj artistoj neniam prezentis. Aŭskultinte ŝian sonbendon, maljuna artisto Zaba ege miris kaj senĉese laŭdis. Antaŭ sia forpaso la maljunulo konfidis al Yumei la taskon savi la epopeon "Gesal". ■

SENTENCOJ DE FILOZOFOJ

Han Fei pri leĝa sistemo

Han Fei (280-233 a.K.), reprezentanto de la pledantoj por leĝa sistemo, estis progresema rilate socian koncepton. Li observis la ŝanĝigon de la socio per la malproksimvidaj okuloj. Li pledis por regi ŝtaton per leĝo kaj oponis kontraŭ konservativismo kaj rutinismo. Li prezentis serion da teorioj pri la centralizismo de ŝtato.

Ŝanĝiĝas la situacio, ŝanĝiĝas ankaŭ la aferoj.

Ŝanĝiĝas la aferoj, ŝanĝiĝas ankaŭ la kontraŭrimedoj.

Malsamaj estas la nova kaj malnova socioj,

Diferencaj estu la regmanieroj.

Ne vin katenu per rutinismo, nek imitu tradician kutimon.

Intelektuloj malordigas leĝon per verko,

Militistoj atencas tabuojn per perfortaĵo.

Facilas atingi sian celon kun kondiĉoj,

Sed malfacilas fari tion sen kondiĉoj.

Ĉefministro devenas el inter lokaj oficistoj,

Bravaj generaloj devenas el inter soldatoj.

Simpla

ĉigong-ekzercado

Ĉi-sube ni prezentu specon de medicina ĉigong-ekzercado de Ĉinio. Ĝi estas simpla kaj utila por ĉiuj, sen distingo de sekso kaj aĝo. Ĝi estas kuracefika kaj saniga.

Faru la ekzercadon laŭ jenaj manieroj:

(1) Fermetu la okulojn kaj liberigu vin de ĉiuj pensoj. Sidu kun la kruroj liberaj aŭ interkrucitaj 15 minutojn (Bildo 1).

(2) Malfermu la okulojn. Metu la dekstran piedon sur la maldekstran genuon kaj la dekstran manon sur la internan maleolon de la piedo. Per la maldekstra mankavo frapetu la akupunkturajn punktojn *jongĉjŭan* en la antaŭa parto de la dekstra piedplato (Bildo 2). Virino frapu la akupunkturajn punktojn *jongĉjŭan* en la antaŭa parto de la maldekstra piedplato per la dekstra mankavo. Frapu egalforte, ne tro forte, nek tro malforte, same kiel vi manklakas, tamen pensu en vi "batu forte" pro fiziologia funkcio kaj memoru la fojojn de la frapado.

Fininte la frapadon de unu piedo, same frapu la alian piedon (Bildo 3) tiom da fojoj, kiom por la unua.

(3) Fininte la frapadon de ambaŭ piedoj, silente sidu 15 minutojn laŭ la maniero montrita en bildo 1.

(4) Frapu ambaŭ piedojn po 100 fojojn en la unua tago kaj po 200 en la dua kaj po 300 en la tria. Se vi frapas por sanprotekto, do vi frapu la piedojn po 300 fojojn ĉiutage en mateno kaj vespero respektive. Se vi estas malforta aŭ malsana, do vi devas frapi plurfoje ĉiutage, ĉiufoje faru malpli ol 900 frapojn al unu pie-

do.

La ekzercado estas utila por kuraci diversajn kronikajn malsanojn, precipe senilajn. Ĝi estas sedativa, kvietiga kaj refreŝiga. Ĝi estas utila ankaŭ al la kreskado de infanoj kaj geknaĵoj.

Kion maljunuloj devas atenti en la fizika ekzercado?

Iu 55-jarulo suferis de hipertensio, tamen li faris ĉiam fizikan ekzercadon. Li kuretis, ĉu en frosta vintro, ĉu en varma somero.

Sed foje, en la matena kurado subite li falis kaj ĉesis la spirado. La anatomia ekzameno montris, ke li mortis de cerba hemoragio.

La maljunuloj bezonas fizikan ekzercadon. Ankaŭ la hipertensiuoj ne estas escepto. Sed kion ili devas atenti dum la ekzercado?

Unue, la maljunuloj devas elekti taŭgan sportbranĉon laŭ siaj fiziologiaj trajtoj kaj sanstato. La maljunuloj havas malkompaktajn ostojn kaj facile okazas al ili frakturo, tial en la ekzercado ili devas eviti falon kaj frapiĝon.

Antaŭ ilia fizika ekzercado oni devas ekzameni iliajn sangpremon, ritmon de la korbatoj, pulman spiradon kaj funkcion de la hepato kaj renoj. Oni devas fari al ili ankaŭ elektrokardiogramon, encefalogramon k.a.

Due, por maljunuloj estas utilaj malintensaj kaj longatempaj sportoj. Sciencaj praktikoj montris, ke la malpli-ol-unu-hora fizika ekzercado estas benefika por maljunuloj. Kompreneble, oni povas iom post iom intensigi sian sportadon, sed ili neniel devas esti tro hastemaj en la ekzercado, por ke ne okazu ia ajn vundo.



Sidu kun la kruroj liberaj



Sidu kun la kruroj interkrucitaj



Sidu kun la kruroj unu sur la alia

Trie, kelkan tempon post la fizika ekzercado, la maljunuloj devas pensi, ĉu ili dormas bone, ĉu ili sentas sin lacaj, ĉu ilia apetito plibonigas, ĉu ili estas bonhumoraj, ĉu ili volas daŭrigi la ekzercadon, ĉu ilia laborkapablo levigas ... Se ili sentas sin malpli bone ol antaŭ la fizika ekzercado, ili devas reguligi sian sportadon sub direktado far trejnisto kaj kuracisto. ■

ZHANG WEN:

“Kretacea parko” de Ĉinio

1993 povus nomiĝi internacia dinosaŭra jaro.

En 1993 fama usona reĝisoro Steven Spielberg produktis la sensacian filmon “Ĵurasa Parko”, kiu prezentas al la rigardantoj strangan spektaklon de ĵurasa periodo, pli ol 100 milionojn da jaroj antaŭe, kiām dinosaŭroj regis en la mondo. Por produkti la filmon oni elspezis proksimume 10 milionojn da usonaj dolaroj.

En la sama jaro ĉe alia flanko de Pacifiko, de la interna parto de Ĉinio aŭdiĝis la novaĵo: “En Xixia (Ŝjiŝja)-gubernio de la okcidenta Henan-provinco malkaŝiĝis fosilioj de dinosaŭraj ovoj en areo de 40 kvadrataj kilometroj. La preciza nombro de la ovoj nun ankoraŭ ne estas konata...” Xixia, senfama malproksima loko, altiris al si atenton de la mondo.

Ĉinio estas lando, kie troviĝas plej multe da fosilioj de dinosaŭraj ovoj. En la 20-aj jaroj de la kuranta jarcento oni trovis tiajn fosiliojn en la Interna Mongolio. Dum la sekvantaj dekoj da jaroj oni trovis ilin en 14 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj, inter ili Nanxiong (Nanŝjong) de Guangdong kaj Xixia estas la plej famaj. Fakuloj opiniis, ke la ĉi-foja eltrovo en Xixia probable estas mondfama. En la naturo malofte fosiliĝis animalaj estaĵoj. Ĉar la dinosaŭraj ovoj estis maldikŝelaj kaj rompiĝemaj, por ili fosiliĝo estis pli malfacila. Estas mirinde, ke la fosilioj de dinosaŭraj ovoj en Xixia estas tiom grandnombraj, multspecaj, bone rezervitaj kaj troviĝas en tiom granda areo. Fakuloj diris, ke tio estas la plej antikva fosilia dinosaŭra ovaro en Ĉinio. La ovaro apartenis al la mezozoika kretaceo.

Ĉinaj sciencistoj jam antaŭ longe sciis, ke en Xixia troviĝas fosilia dinosaŭra ovo, sed la ĉi-foja eltrovo estis tute hazarda. Aŭguste de 1992 kamparano elfosis nombron da ŝtonaj ovoj, konstruante vojon. Ne sciante, kio tio estas, li kunportis unu hejmen. Efektive, multaj tieaj kamparanoj vidis tiajn ovojn, sed nen-



En ordigado de fosilioj de dinosaŭraj ovoj

iu ilin priatentis. Poste, geologo ekspertizis la ŝtonan ovon kaj konstatis, ke ĝi estas fosilio de dinosaŭra ovo. Sekve de tio, en mallonga tempo la tieaj kamparanoj ŝtele elfosis pli ol 5 000 tiajn ovojn, grandajn kaj malgrandajn, rondajn kaj ovalajn. La malgranda longas dekelkajn centimetrojn, dum la granda 30-40 centimetrojn kun diversaj strioj sur la ŝeloj.

Kial en Xixia estas tiom da fisiliaj dinosaŭraj ovoj? Fakuloj ankoraŭ ne povas doni konvinkan respondon. Laŭ analizo la kaŭzo eble kuŝas en tio, ke antaŭ tre longe la loko estis taŭga por dinosaŭroj demeti ovon. Fakte, estis diversspecaj dinosaŭroj, ĉiu havis siajn proprajn vivkutimojn. Oni devas unue studi pri tio, kia kondiĉo plej taŭgis por ovodemeto far dinosaŭroj. Iuj supozis ankaŭ, ke la dinosaŭraj ovoj estis kunportitaj tien de inundo aŭ transportitaj de iaj bestoj. Ĉiaokaze la eltrovo oferis ŝlosilon por solvi la enigmon de dinosaŭroj, precipe donis fortan sciencan bazon por studi la vivkondiĉojn de dinosaŭroj. Xixia, malgranda gubernio en Henan, fariĝos “kretacea parko” de Ĉinio — sankta loko por studi dinosaŭrojn. ■

En domo de oficistoj kaj laboristoj

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de SUN YI

LA Yanshan-a Petrola Kemiindustria Kompanio de Pekino estas moderna granda kombinato, kiu sidas en antaŭurbo de Pekino. Kiam falas nokto, tie brilas sennombraj lampoj kiel en urbaj kvartaloj. Post vespermanĝo multaj oficistoj kaj laboristoj kun siaj infanoj gaje pasigas postlaborajn horojn en diversaj amuzejoj de la kompanio. Ili dancas, kantas, ludas ĉinan ŝakon aŭ faras fizikan ekzercon. Iu laboristo, kiu laboris tie pli ol 20 jarojn, diris al mi: "Nun la kompanio estas provizita per diversaj instalaĵoj por amuzado. Ĉiuj oficistoj kaj laboristoj povas sin amuzi per ili laŭ sia plaĉo. Eble en la urbo estas same tiel, ĉu?"

La instalaĵoj estas aranĝitaj de la sindikato de la kompanio por riĉigi la postlaboran vivon de oficistoj kaj laboristoj, kiuj estas mastroj de la entrepreno. La sindikato, kiel propra organizaĵo de oficistoj kaj laboristoj, starigis por ili serion da bonstatigaj sistemoj. Tao Guiying, vicprezidanto de la sindikato de la kompanio, diris al mi: "La sindikato zorgas pri la edz(in)iĝo, kuraco kaj funebraĵoj de la oficistoj kaj laboristoj kaj ankaŭ pri la vivo de emeritoj." Ŝi diris ankaŭ, ke infano de laboristino suferis de leŭkemio kaj bezonis grandan monsumon por kuracado. Kiam la patrino tre maltrankviliĝis pri tio, ŝin atingis rimarkinda monsumo kolekti-

ta de la sindikato ĉe la oficistoj kaj laboristoj. La kompanio havas sub si 30 fabrikojn, ĉiu kun filio de la sindikato. Dank' al ilia servemo, la sindikato fariĝis konfidinda de 52 000 oficistoj kaj laboristoj de la kompanio.

Krome, la sindikato de la kompanio ankaŭ partoprenas en ekonomia administrado. Kiel ponto inter la gvidantoj kaj laborantoj de la kompanio, ĝi ludas sian rolon. En 1985 la sindikato ekpraktikis la sistemon de kongreso de oficistoj kaj laboristoj sur la niveloj de kompanio, fabriko kaj laborejo. La oficistoj kaj laboristoj povas elekti siajn reprezentantojn por partopreni en administrado de la entrepreno.

La sistemo ne estas senmanka. Ekzemple, la kongreso povas en-

tuziasmigi reprezentantojn de oficistoj kaj laboristoj, kiuj konsistigas 10% de ili, dum ĉiuj aliaj oficistoj kaj laboristoj ne havas la eblon plene montri sian aktivecon. Por ŝanĝi la staton la sindikato de la kaŭĉuka fabriko de la kompanio praktikas la sistemon de kunveno pri demokratia administrado. Laŭ la specifo de la sistemo ĉiu grupo kunvenas po unu fojo monate kun partopreno de la membroj. En la kunveno ili diskutas pri la produktado de la fabriko, distribuado de premio, laboro de la grupo kaj aliaj, sume dek temoj.

La sistemo stimulis la aktivecon de la grupanoj. En 1990 al la fabriko multe mankis krudmaterialoj kaj sufiĉe granda konsumo okazis en la produktado. La gvi-

La Nova Kultura Domo de Laboristoj



dantoj de la fabriko, akceptinte proponojn de laboristoj, sendis aĉeti materialojn aliloke kaj alprenis rimedojn por redukti konsumon. Fine de la jaro, la produktokvanto de la fabriko unuafoje superis 60 000 tunojn.

La sindikato de la kompanio resumis la sperton de la kaŭĉuka fabriko kaj diskonigis ĝin inter ĉiuj aliaj grupoj. Nun 85% de la grupoj de la kompanio praktikas la sistemon.

Samtempe kun praktikado de la sistemo, la sindikato turnas sian atenton al disvolvo de la aktiveco de estroj kaj membroj de siaj filioj. La filio pri muntado sub la kompanio elpensis la administran modelon de du estroj en la grupo. T.e., la estro de sindikata grupo elektita de oficistoj kaj laboristoj kumule funkcias kiel vicestro de produkta grupo. En tiu jaro, la fabriko prenis sur sin la taskon fari ŝtalan ujon de eteno. Dank' al la kunlaboro inter la du grupestroj, la tasko estis bone plenumita.

Por bone fari produktadon, la sindikato de la kompanio aranĝis diversajn aktivadojn kaj ellaboris ekzamenajn regulojn. En la aktivadoj la oficistoj kaj laboristoj helpis unu al alia. Post tri jaroj 80% de la 400 sindikataj grupoj de

la kompanio estis kvalifikitaj. Iuj el ili estis honoritaj per la titolo "domo de avangardaj oficistoj kaj laboristoj de la kompanio", aliaj estis aljuĝitaj kiel "domo de modelaj oficistoj kaj laboristoj de Pekino".

Por havi sian pozicion en la kompanio, la sindikato aktive partoprenis en farado de gravaj decidoj de la kompanio kaj ĝiaj ekonomiaj aktivadoj. Dum multaj jaroj ĝi partoprenigis reprezentantojn de oficistoj kaj laboristoj en ellaboro de gravaj decidoj de la kompanio kaj en kontrolo de ilia efektivigo, cele garantii la proprajn interesojn de la oficistoj kaj laboristoj.

La papero de laŭkontrakta produktado de la kompanio estas subskribita ne nur de la direktoro kaj fabrikestro de la kompanio, sed ankaŭ de prezidantoj de sindikatoj kompania kaj fabrika. Laŭ la bezono de produktado la diversnivelaj sindikatoj ĉiujare aranĝas labor-konkurson plurfoje. Ili partoprenas en la konkurso de la pokalo por pliigi produktajn kaj praktiki ŝparemon, kun la celo efektivigi ekonomiajn normojn, faras laŭperiodan ekzamenadon kaj jarfinan aljuĝadon; en la konkurso de instalaĵa rekordo, kun la celo normigi 20 kom-

pletojn da gravaj instalaĵoj, pli-grandigi produktokvanton, redukti konsumon kaj teni kvaliton en stabileco; en la konkurso inter grupoj por pli kvalifiki laboristojn kaj sekure irigi ĉiujn instalaĵojn; kaj en la konkurso por plenumi la taskon ripari instalaĵojn bone kaj rapide.

La aktivadoj aranĝataj de la sindikato ne nur intimigas la rilatojn inter la oficistoj kaj laboristoj kaj la kompanio, sed ankaŭ plifortigas ilian mastrecon pri la kompanio.

Mi informigis de s-ino Tao, ke komence de 1990 okazis ŝtopiĝo al turo de la instalaĵo por malkombini 300 000 tunojn da eteno. Por redukti la perdon la kompanio decidis ripari ĝin kiel eble plej rapide kaj aranĝis konkurson ĉe la riparejo. Dum riparado riparantoj konkure laboris en la turo unuj post aliaj kaj fine plenumis la taskon kvin tagojn antaŭtempe.

Somere de 1990 okazis superakvego en 18 provincoj de Ĉinio. Responde al la alvoko de la sindikato, la oficistoj kaj laboristoj de la kompanio en kelkaj tagoj oferis 1.6 milionojn da juanoj al la plagitaj regionoj. La laboristoj diris: "Ni ne devas rigardi ĉeflanke, kiam aliaj havas malfacilon." ■

Respondecoj de la sindikato kaj laboristoj







En konkurso de ŝnurtirado



Por festi la nas-
kiĝtagon de mal-
juna laboristo





En la kultura centro de laboristoj



Premiitoj en labor-
konkurso organi-
zita de la sindika-
to



Teknikistoj en laboro

EKONOMIO

● En 1993 la kvanto de greno, viando kaj akvo-produktaĵoj de Ĉinio grandamplekse kreskis kompare kun tiu en 1992, tiel ke estis plue kontentigitaj la vivbezono de la popolo kaj la liverado dum la Printempa Festo de Ĉinio. Antaŭ la festo en la Ĉina Agronomia Ekspoziciejo en Pekino okazis la Dekaj Ekspozicio de Agrikulturaj kaj Flankokupaj Produktaĵoj, en kiu vendiĝis ĉ. 10 000 specoj da lokaj produktaĵoj, fruktoj kaj manĝaĵoj.

● Post trijara laborado finkonstruiĝis kaj transdoniĝis al uzado la unuaperioda konstruo de la Fabriko por Trakti Malpuran Akvon de Gaobeidian en la sudokcidenta ĉirkaŭurbo de Pekino. Ĝi estas la plej granda kaj plej avangarda konstruo de Ĉinio tiurilate. Ĉiutage ĝi traktas 0.5 milionon da kubmetroj da malpura akvo. Ĝi mem povas trakti 1/4 de la malpura akvo de Pekino.

● En suda Ĉinio aperis urba regiono ĉe Perlorivero. Ĝi komenciĝas norde de ambaŭ bordoj de la rivero ĉe Kantono kaj finiĝas sude ĉe ĝia enfluejo. En la regiono estas la urboj Kantono, Hongkong, Aomen, Shenzhen, Zhuhai, Foshan, Dongguan, Zhongshan, Shunde, Nanhai kaj Panyu kaj 117 urbetoj. Ĝi kovras 13 000 kvadratajn kilometrojn, kun 16.58 milionoj da loĝantoj. En 1991 la produkt valoro de industrio konsistigis 97.6% de la totala produkt valoro de industrio kaj agrikulturo, pli multe ol tiu en Ŝanhajo, la plej granda urbo de Ĉinio.

MEDICINO

● Profesoro Fan Qingyu (Fan Ĉingju), ostokuracisto de la hospitalo Tangdu de Xi'an (Ŝji'an) en nordokcidenta Ĉinio, akiris rimarkindan sukceson en kuracado de maligna ostomo. Li sukcese faris sakroman operacion al 32 suferantoj, iuj el kiuj ankoraŭ vivas ses jarojn post operacio.

● Marte de 1994, la Reĝa Politekniko de Melburno ekfunkciigis magistrecan kurson pri ĉinmedicina aplikado.

Estas la unua fojo, ke la ĉina medicino estas listigita kiel lernobjekto en alta lernejo de Okcidento.

NATURPROTEKTADO

● Sur la Ordos-a Altebenaĵo en la suda Interna Mongolio de

Ĉinio vivas miloj da restintaj larvoj, malaperantaj en la mondo.

La rara birdo havas nigrajn plumojn sur la kapo kaj kolo, po unu blanka vejno en U-formo malantaŭ la okuloj kaj neĝblankajn plumojn sur la korpo. En la mondo estas nur ĉ. 3 000 paroj da tiaj birdoj, sed la restintaj larvoj, kiuj vivas ĉe la lagoj de la Ordosdezerto de Ĉinio, konsistigas 30-40% de la totala nombro de la birdoj en la mondo.

TURISMO

● La Kavernoexplora Trupo el Ĉinaj kaj Alilandaj Fakuloj certigis post mezurado, ke la kaverno Shuanghe en Suiyang-gubernio de la norda parto de Guizhou-provinco longas 35.2 kilometrojn kaj estas la plej longa en Ĉinio.

La kaverno, kiel giganta grota sistemo, konsistas el dek kavernoj, kelkdek kavernetoj kaj tri subteraj riveroj. La akvaj kaj sekaj kavernoj kruciĝas inter si. La kaverno Shigaojing longas 700 metrojn, en ĝi pompas ŝtonaj floroj el naturaj gipsaj kristaloj. Oni diris, ke pro la danĝera situo ĝis nun oni ankoraŭ ne scias, kiom longa estas la kaverno Shuanghe efektive, nek konas tri subterajn grotajn en ĝi.

● Lastatempe komenciĝis la konstruado de la Singapura Ĝardeno, investita de Singapuro, en la pitoreskejo de la okcidenta ĉirkaŭurbo de Hefei, Anhui-provinco. La ĝardeno kovras 40 hektarojn kaj estas la tria singapura ĝardeno en Ĉinio. La konstruado daŭros kvin jarojn.

● La pagodo Malgranda Sovaĝansero estas historia restaĵo en la antikva ĉefurbo Xi'an. En la korto, kie staras la pagodo, estas la fama vidindaĵo "Yanta Chenzhong" (Matena Sonorilo de la Pagodo).

La sonorilo pezas 8 000 kilogramojn. Antaŭe, meze

La Gaobeidian-a Fabriko por Trakti Malpuran Akvon



de la planko de la kampanilo estis putoforma kavo, profunda je pli ol unu metro, kontraŭ la buŝo de la supre pendanda sonorilo. Kiam oni frapis la sonorilon, tra la kavo sono profunde penetris en la teron. En la 20-aj jaroj de la nuna jarcento, en milito la sonorilo difektiĝis de bombado kaj aperis sur ĝi sep metrojn longa fendo. De tiam la sonorilo silentis pli ol 70 jarojn.

Por reaprigi la antikvan aspekton de la urbo kaj bonvenigi la alvenon de la turisma jaro 1994 pri historiaj restaĵoj, la urbo riparas la sonorilon kaj la kavon laŭ ĝia origina formo. Nun la sonorilo sonas kiel antaŭe.

KULTURO

● En 1994 Ĉinio produktos 150 rakontajn filmojn, 60% de kiuj temas pri la reala vivo. Nun la filmistaj rondoj preparas sin por la tri memoraktivadoj de Ĉinio por 1995. La aktivadoj estos:

Memore al la 100-a jubileo de la filmo de la mondo — en 1895 la francaj fratoj Lumière kreis filmon; memore al la 90-a jubileo de la filmo de Ĉinio — en 1905 en Pekino oni filmis parton de la pekina opero "Dingjunshan (Dingĝjunŝan)". Kaj memore al la 50-a jubileo de la venko en la Kontraŭfaŝisma Milito de la mondo, oni projekcios historiajn filmojn disradiantajn patriotismon kaj heroismon.

● En 1993 la Ĉina Radio Internacia ricevis sume 554 122 leterojn el 173 landoj kaj regionoj. Laŭ kalkulo, unu letero reprezentas 300-500 aŭskultantojn. Tial la radio havas ĉ. 200 milionojn da aŭskultantoj en la mondo kaj fariĝis unu el la internaciaj radioj, kiuj havas plej multe da aŭskultantoj.

● Kampanoj de la Mayang-a Mjaŭ-nacia Aŭtonoma Gubernio en la okcidenta parto de Hunan-

Juna kampano-pentristo Yu Fei



Arkeologoj en prifosado de la antikva tombo

provinco kreis pentraĵojn kun aparta gusto kaj en 1993 pli ol 200 tiaj pentraĵoj estis venditaj en Usono, Francio kaj Aŭstralio. En la gubernio estas ĉ. 260 junaj pentristoj kaj plejparto de ili estas mjaŭ-oj. Nun la gubernio jam fariĝis alia lulilo de modernaj ĉinaj popolaj pentraĵoj, post Huxian(-Huŝjan)-gubernio de Shaanxi(Ŝaanŝji)-provinco kaj Jinshan(Ĝinŝan)-gubernio de Ŝanhajo.

● Post serioza argumentado de fakuloj, la tombo de la klano de la princo de Changsha en la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.) en Changsha, Hunan-provinco, estos malkovrita post nelonge. Ne nur la rango de la entombigito, sed ankaŭ la skalo de la tombo estas pli granda ol tiu de la tombo Mawangdui de Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.), kiu estis malkovrita en la 70-aj jaroj kaj sensacia al la mondo. Nun 17 gigantaj tabuloj de ĉerko, ĉiu kun pezo de almenaŭ unu tuno, kaj 60 premtabuloj estas jam elterigitaj. Oni diris, ke la kavo de la tombo longas 39 metrojn, la ĉefa ĉambro de la tombo longas 15.5 metrojn kaj larĝas 13.2 metrojn. En la tri kavoj por entombigitaĵoj oni elterigis pli ol 200 argilajn homfigurojn, ceramikaĵojn kaj lakaĵojn. La nombro de la elterigitaĵoj estas la plej granda inter la malkovritaj tomboj de vasaloj de Han-dinastio, sude de Yangzi-rivero.

● Lastatempe ĉinaj kaj usonaj geofizikistoj anoncis, ke Himalajo en sudokcidenta Ĉinio estigis pro interpuŝego de la Hinda kaj Lhasa-a Kontinentblokoj. En la pasintaj 50 milionoj da jaroj la Hinda Kontinentbloko rapide movis sin sub la Azian Kontinenton, ke dikiĝis la terkrusto de Himalajo kaj la plej granda dikeco estas ĉ. 75 000 metroj.

Miniatura kajto

Teksto kaj fotoj de LI QIANG

KAJTO, speco de ĉinaj metiartaĵoj, estas ĉiam ŝatata de la ĉina popolo. Ĝi, taŭga por apreco, amuzo, konkurso kaj sporto, havas intimajn rilatojn kun popola moro, sezono, tekniko kaj pentrado.

Ĉinio estas naskiĝloko de kajto. Historia materialo diras, ke la kajto naskiĝis antaŭ 2 000 jaroj. Tiam oni faris kajton el ligno en formo de aglo, nomatan ligna aglo. Poste aperis kajto el papero. En la Kvin Dinastioj (907-960 p.K.) oni fiksas bambuan fajfilon sur kajto. Kiam flugis la kajto, la fajfilo sonis kontraŭ la vento. En la antikveco belaj kajtoj funkciis kiel ludilo ĉefe por korteganoj kaj nobeloj. Nur en la lastaj jaroj de Qing-dinastio (1644-1911) ili fariĝis popolaj metiartaĵoj. Multaj metiartistoj sin okupis je kajtofarado kaj aperis diversaj skoloj. La kajto ekhavis siajn apartajn trajtojn. Miniatura kajto estas unu el la specoj. Ĝi estas malgranda kaj delikate farita. Oni povas flugigi ĝin por amuzo kaj ankaŭ kolektas ĝin por apreco.

S-ro Leng Shixiang (Leng Ŝiŝjang) estas fama faranto de miniaturaj kajtoj. Li havas multajn skatolojn kun miniaturaj kajtoj ene. Generale dirite, la kajtoj de malpli ol 15×15 cm estas rigardataj kiel la miniaturaj. Sed tiuj faritaj de Leng estas multe malpli grandaj ol la normo. La plej malgranda el liaj kajtoj, kun vizaĝo de homfiguro en pekina opero, estas nur 0.7×0.7 cm, egale al kvarono de la homa dika fingro, kaj malpli peza ol unu sezamsemo. Eĉ formiko povas movi ĝin.

“Kvankam la miniatura kajto estas tre malgranda, tamen ĝi posedas ĉiujn karakterizaĵojn de normala kajto,” diris s-ro Leng. Samkiel aliaj kajtoj, ankaŭ tiuj de Leng estas faritaj per kunligado, surgluado kaj pentrado. Malgraŭ

sia malgrandeco, ili ĉiuj taŭgas por flugi.




S-ro Leng ĉiam kun streĉita atento faras miniaturajn kajtojn. Antaŭ ĉio li kunigas la skeleton. Li hakas la bambuon en striojn kaj tranĉas la striojn en maldikajn fadenojn. Poste li kurbigas la maldikajn fadenojn en formo de kajta skeleto. Laŭ tradiciaj manieroj s-ro Leng neniam uzas gluaĵon sed fikse kunigas la skeleton per silkfadeno.

Glui paperon al la skeleto bezonas grandan atenton. Multfoja provo montris al s-ro Leng, ke la malpeza kotona papero estas bona materialo. Li tranĉas la paperon en la bezonatan formon kaj poste gluas ĝin al la skeleto. Per gluaĵo speciale farita de li mem, li faras la gludadon atenteme kaj rapide, ĉar la malpeza papereto estos facile forblovita de forta spiro.

Pentri sur la papereto estas la tria paŝo. La naturo de farbo kaj uzado de akvo estas ŝlosila faktoro por la pentrado. Oni devas pentri per konvena forto. Tro forta pentrado detruos la paperon, dum per tro milda agado oni ne sukcesos kolorigi la paperon. Pentri sur la malgranda paperpeco desegnojn bezonas lertecon.

Fininte faradon de la miniatura kajto, oni provas flugigi ĝin. Kiam oni flugigas grandan kajton, kiu flugas alten kaj foren, li sentas fortan tiron de la kajto. Flugigi miniaturan kajton estas alia afero. Kiam la kajto flugas sur la ĉielo, vi ne vidas ĝin, sed sentas ĝin tra la fadeno en via mano.

Dank' al penado de ĉinaj kajtofarantoj, kia s-ro Leng Shixiang, kiuj kunfandas modernajn ideon kaj teknikon kun antikva ĉina metiarto, ĉinaj miniaturaj kajtoj kun apartaj karakterizaĵoj estas alte taksataj de la tuta mondo kaj multfoje premiitaj en internacia kajto-konkurso. Multaj el ili estas konservataj en muzeoj kaj galerioj. ■



FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Manplektita tapiŝo kun
Esperanta vorto

de **OLAV BJØRNSRUD**
(Norvegio)

Vintra pejzaĝo en Belgio
de **JEAN-CLAUDE THUMERFUE** (Francio)



ISSN 0032-4361



世界语《中国报道》一九九四年第五期
(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2

